

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

44a jarkolekto, majo 2023/05

Italio kaj ĝia lingva mozaiko

Ebla respondo al niaplaneda krizo pri nesala akvo

**Nekutima internacia
virina tago en Kartvelio**



En tiu ĉi numero

FOTO DE LA KOVRILLO: NINO GOGIDZE

	leteroj	3
	el diplomatia vidpunkto	
	PACO	4
	➤ Amuza disputado solvita	
	politiko	
	KARTVELIO	5
	➤ Nekutima internacia virina tago	
	RUANDO/BURUNDO	7
	➤ Ĉu orient-afrikaj ĝemeloj kuniĝos?	
	moderna vivo	
	VIENO	8
	➤ Novaj metro- kaj akvo-vojoj	
	KONKURSO	9
	➤ Eŭropa premio por aŭstra vilaĝo	
	RUSIA INVADO	10
	➤ Ĉu novtipa komercado?	
	lingvo	
	INTERVJUO	11
	➤ Italio kaj ĝia lingva mozaiko	
	ESEO	14
	➤ Apologio pri mia vivo	
	medio	
	AKVA KRIZO	16
	➤ Ebla respondo al niaplaneda krizo pri nesala akvo	
	VIDATE SCIENCISTE	19
	➤ Kiel la mondo reale funkcias	
	spirita vivo	
	RELIGIOJ	21
	➤ La bahaa kredo: vojo al unueco kaj paco	
	literaturo	
	ESEO	24
	➤ Kio estas oblomovismo?	
	FRANCIO	26
	➤ Roger Martin du Gard, literaturisto kaj pacisto	
	libroj	
	➤ Post Babelo estu lingvo monda, sed kulture eŭropa	27
	➤ Ĉu unika priskribo de lesba rilato?	28
	➤ Infanlibro pri diverseco	29
	➤ Tolerema Esperanto-movado	31

Monato

INTERNACIA MAGAZINO SENDEPENDA

www.monato.be

MONATO, internacia magazino sendependa pri politiko, ekonomio kaj kulturo en la internacia lingvo Esperanto; fondinto: Stefan Maul; 44a jar-kolekto; aperas principe la 15an de la antaŭa monato, escepte de aŭgusto.

MONATO havas 159 korespondantojn kun kunlaborkontrakto en 47 landoj kaj abonantojn en 64 landoj; aperas nur originale en Esperanto verkitaĵoj (ne tradukoj); represoj kaj tradukoj el MONATO nur kun indiko de la fonto; MONATO estas eldonata en tradicia papera versio kaj bite en la formoj PDF, ePub, Kindle kaj en voĉlegita versio; la enhavo de la artikoloj ne nepre kongruas kun la opinio de la eldonejo.

eldonejo:

Vlaamse Esperantobond v.z.w. (Flandra Esperanto-Ligo), Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen, Belgio; telefono: + 32 3 234 34 00; retpoŝto: eldonejo@monato.be; Skype: fel-monato; BE0419 028 122 - RPR Antwerpen.

abontarifo:

La abontarifo varias laŭlande. Vd. en MONATO 2022/11, p. 32 kaj en monato.be/tarifoj.php aŭ petu ĝin de eldonejo@monato.be.

retejo: www.monato.be



sociaj retejoj:

- Twitter: @RevuMonato
- Facebook: facebook.com/revuo.Monato/
- Telegram: monato.telegram.org
- Youtube: www.monato.be/jutubo
- Mastodon: @esperanto.masto.host
- Instagram: RevuoMonato

honora ĉefredaktoro:

Stefan Maul.

ĉefredaktoro:

Paŭl Peeraerts.

revizianto:

Edmund Grimley Evans, Jens S. Larsen, Rob Moerbeek, Brian Moon, Fransoazo Noireau, Manolo Parra, Andrej Peĉenkin, Anna kaj Mati Pentus, Remuŝ, António W. de Ruijter.

faktokontrolanto:

André Ruysschaert

redakcia sekretario:

Paŭl Peeraerts.

Rete: redakcio@monato.be.

grafiko:

Zep Armentano, Ferriol Macip

redaktoroj:

- **Arto:** Aleksej Salomatov, Moskvo, arto@monato.be.
- **Ekonomio:** Roland Rotsaert, Belgio, ekonomio@monato.be.
- **Eseoj:** Sendu al la koncerna redaktoro, depende de la temo.
- **Historio:** Trevor Steele, Aŭstralio, historio@monato.be.
- **Hobio:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, hobio@monato.be.
- **Komputado:** Edmund Grimley Evans, Britio, komputado@monato.be.
- **Leteroj:** Paŭl Peeraerts, Belgio, leteroj@monato.be.
- **Libroj:** libroj@monato.be.
Noto: Librorecenzojn oni ne sendu al la redaktoro propra-iniciate. La kunlaborantoj ricevos la recenzopetojn kaj la librojn de la eldonejo.
- **Lingvo:** Roberto Pigro, Kipro, lingvo@monato.be.
- **Literaturo:** Trevor Steele, Aŭstralio, literaturo@monato.be.
- **Medio:** Andrej Peĉenkin, Rusio, medio@monato.be.
- **Moderna vivo:** Norberto Díaz Guevara, Kubo, moderna_vivo@monato.be.
- **Politiko:** Massimo Ripani, Italio, politiko@monato.be.
- **Scienco:** Roberto Pigro, Kipro, scienco@monato.be.
- **Spirita vivo:** Alberto García Fumero, Kubo, spirita_vivo@monato.be.
- **Turismo:** Evgeni Georgiev, Aŭstrio, turismo@monato.be.

Kia tribismo?

MONATO ne estas la usona revuo *Time*. Ĝi estas pli serioza. Sed bedaŭrinde la artikolo pri Kongo *Kurboriĉa vojo al demokratio* (MONATO 2023/03, p. 3) ŝajnas verkita de ĵurnalisto el *Time*, ĉar ĝi prezentas la militon, kvazaŭ ĝi dependus de afrika tribismo. Efektive en Kongo okazas triba milito, sed la triboj estas A, tiu de la „estraranoj de usonaj multinaciaj kompanioj”, kaj B, tiu de la „estraranoj de neusonaj kompanioj”. Cetere ili ne batalas rekte sed pere de dungosoldatoj. A uzas la usonan registaron, kiu uzas Britujojn, kiu liveras subtenon al Ruando (Demandu vin kial oni volas porti al Ruando azilpetantojn el Britujo, kaj kial Ruando inventis, ke ĝi estas anglalingva lando) kaj B uzas la tre malfortan kongan naci-an armeon, sed ne liveras al ĝi helpon.

UN rigardas, ĉar ĝi ne havas la rimedojn por sendi veran pacigan armeon (demandu vin, kiu neas al UN la rimedojn por starigi pacdefendan armeon. Ne kredu min, esploru dokumentojn de UN). Ankaŭ pri la kialoj de la konga milito ne kredu min, sed legu la bultenon de la tribo A, *The Economist*, kiu havas tutan triumfan dokumenton pri *How America plans to break China's grip on African minerals – A new contest between the US and China is under way* (Kiel Usono planas rompi la ĉinan regon super afrikaj minajoj – sur

vojas nova streĉo inter Usono kaj Ĉinujo).

Daŭra leganto kaj legiganto de MONATO,

Renato CORSETTI
Britujo

Dankon al Julius Hauser, sed ne nur

Mi deziras skribi al la redaktantoj de MONATO por esprimi mian kontenton: vere interesaj artikoloj. Kontribuo, kiu ne nur interesis min, sed eĉ instruis al mi ion, estas la artikolo pri Olaf Scholz suspektata pri malhonestaj financaj agoj. Tiun informon mi ne estis leginta en franclingva ĵurnalo. Nu, ni simplaj civitanoj ne plu emas fidi al profesiaj politikistoj! Grava danĝero por demokratiaj sistemoj.

Per kiuj kriterioj ni povas decidi, ĉu artikolo estas interesa aŭ ne?

1/ Ĝia temo estu interesa; ĝi malkovru al ni ion nekonatan, malkovrante realaĵojn de aliaj landoj. Tial dankon al la korespondantoj, kaj precipe al tiuj de landoj tute ne konataj de mi: Indonezio, Japanio, Ĉinio, Ĉilio ktp.

2/ Ĝi alportu al ni informon kaj pripensadon. Por tio plej elstaras la artikoloj de nia diplomata emerito, Julius Hauser. Ĉiuj liaj artikoloj alportas analizadon. En la lasta (pri Kongo) li bone substrekis la katastrofan situacion de eks-Zairo, poluita de korupto, lando pri kiu tre

malofte parolas amas-informiloj, male al Ukrainio. Sed je mia opinio li tro substrekis la etnan aspekton (ekzemple tucioj venĝas sin kontraŭ hutuoj) kaj ne sufiĉe montris la gravecon de ercoj (koltano, kobalto ktp). Ĝuste tiuj riĉaĵoj allogas internaciajn kompaniojn kaj iliajn registrojn.

Pierre GROLLEMUND
Francio

Admirinda laboro

Estas admirinda via laboro! Eldoni monatan gazeton postulas disciplinon, mastrumkapablon kaj plurajn aliajn kvalifikaĵojn. Mi estas mem redaktoro de faka gazeto en Esperanto kaj multe lernas de via agado kaj redaktopolitiko.

Leandro ABRAHÃO
Brazilo

Verne ne ŝtelis

En la cetere ĉarma kaj plaĉa teksto „Mi ne estas bibliofilo” de Orlando E. Raola (MONATO 2022/12, p. 23-25) mi legis kun konsenteno: „la ... libro de Jules Verne *La 500 milionoj de la Begumo*. Cetere, oni diras, ke li mem ne verkis, ke li ŝtelis de iu. Tio ne gravas.”

Kompreneble, ke tia akuzo gravas! Verne tute ne ŝtelis. Reale, lia eldonisto Pierre-Jules Hetzel aĉetis sufiĉe rudimentan manuskripton aŭtoritan de Paschal Grousset kaj petis sian aŭtoron/amikon Jules Verne

revizii ĝin. Verne akceptis la taskon ĉefe pro lojaleco al Hetzel, kaj lia tasko montriĝis sufiĉe ampleksa, por ke la rezulto estu rajte konsiderebla kiel verko de Verne mem.

István ERTL
Luksemburgo

Ne universala (2)

Mi kompreneble bonvenigas la laŭdindan zorgon de Brian Moon pri la intereso je artikoloj aperintaj en MONATO (2022/12, p. 3). Kaj neniel neus lian rajton opinii. Tamen, la demandon „Kiom tio interesas la ĝeneralan legantaron de MONATO, kiu ne estas majoritate katolika kaj grandparte eĉ ne kristana?” mi trovas sufiĉe stranga.

Laŭ tia rezonado, artikolo pri japanaj arto aŭ kutimoj ne estus interesa por la legantaro, majoritate ne-japana kaj eĉ neazia; artikolo pri bizaraj filatelaĵoj estus interesa nur por manpleno da legantoj, kiuj majoritate ne estas kolektistoj, do ne meritus aperigon; artikolo pri veganismo ne meritus legadon, ĉar la plimulto da legantoj ŝatas manĝi viandon ... Se diri la veron, mi dezirus vidi pli bone elpensitan argumenton.

Kiom mi komprenas la aferon, nia legantaro estas tre larĝmensa kaj interesiĝas pri multege da aferoj.

Alberto GARCÍA FUMERO
Kubo

PACO

Amuza disputado solvita



Julius HAUSER

La sensenca kaj sanga milito en Ukrainio, kaŭzita de rusa agreso, estis la ĉefa politika temo de ĉiuj mondaj gazetoj pasintjare. Tamen ne multaj el ni scias, ke ekzistas ankaŭ alia duflanka diplomatia konflikto inter du pacaj ŝtatoj kaj membrolandoj de Nord-Atlantika Traktat-Organizaĵo (NATO), kiu ne aperis sur la ĉefpaĝoj de mondaj gazetoj. Ĝi estas disputado pri la eta arka insuleto, gronlande nomata Tartupaluk (*Hans Ø*, insulo Hans laŭ la danoj), kiu ne havas ekonomian signifon. La disputado pri ĝia proprieto inter Kanado kaj Danio komenciĝis en 1930 kaj rezultigis unu el la plej bizaraj diplomatiaj konfliktoj, kiujn oni povas enmeti ankaŭ en la kategorion de amuza kaj ridiga diplomatio. Juĝu mem!

Historio

Dezerta kaj neloĝata insuleto troviĝas en la arka nordo, meze de la markolo Kennedy, inter la kanada insulo Ellesmere kaj dana Gronlando. Ĝin malkovris en 1871 usona polusa esploristo Charles Francis Hall (1821-1871) kaj nomis laŭ inuita membro de lia ekspedicio, Hans Hendrik Suersaq (1832-1889). Je unua rigardo la insuleto ne estas interesa. Ĝi havas areon de nur 1,3 km² kaj estas proksimume trioble pli granda ol la plej malgranda ŝtato de la mondo, Vatikano. Ĝi estas nur granda roko, kie ne troviĝas minerala riĉaĵo kaj vegetaĵaro. Eĉ birdoj kaj blankaj ursoj ne vivas tie. Onidire, ĝi donas nur belan vidon al la markolo kaj la ĉirkaŭaj glaĉeroj.

Kanado kaj Danio interesiĝas pri la posedo de

la insuleto ekde 1930. La iama Konstanta Kortumo de Internacia Justico¹ starigita kadre de la Ligo de Nacioj, deklaris la juran statuson de Gronlando favore al Danio. Danio tiam asertis, ke geologia indico montras, ke Tartupaluk estas parto de Gronlando, kaj tial ĝi apartenas al Danio. La dua mondmilito kaj la posta malvarma milito levis pli gravajn politikajn kaj diplomatiajn temojn, kaj ambaŭ landoj ne rememoris pri la insuleto ĝis 1984.

Alkohola milito

En tiu jaro, kanadaj soldatoj elŝipiĝis sur la in-

suleton, enterigis kanadan viskion kaj hisis la kanadan flagon. Kiam ili foriris, la danoj venis al la insulo kaj forigis la kanadajn simbolojn. Ili hisis la danan flagon kaj enterigis botelon da dana alkoholaĵo. Dum jardekoj ŝanĝiĝis la flagoj sur la insuleto kune kun la boteloj da tradicia alkoholaĵo de ambaŭ ŝtatoj. Tiamaniere dana alkoholaĵo batalis kontraŭ kanada viskio. Ekestis ankaŭ gugla milito, kiam ambaŭ landoj influis interretajn esplorojn por subteni siajn teritoriajn pretendojn pri la insuleto.

Diplomatia solvo

Duflankaj diplomatiaj intertraktadoj fine sukcese solvis ĉi tiun bizaran kaj longdaŭran teritorian disputon. La 14an de junio 2022 la kanada ministro pri eksterlandaj aferoj Mélanie

Joly, la dana ministro pri eksterlandaj aferoj Jeppe Sebastian Kofod kaj la gronlanda ĉefministro Mute Inequnaaluk Bourup Egede subskribis interkonsenton pri divido de la insuleto. La orienta parto de la insuleto apartenas al Gronlando, la okcidenta parto al la kanada teritorio Nunavuto. La traktato ekvalidos post aprobo de la kanada, dana kaj gronlanda parlamentoj kaj la leĝdona asembleo de la kanada teritorio Nunavuto. Tiamaniere Kanado havas internacian terlimon de 1280 metroj kun membroŝtato de Eŭropa Unio (EU), nome Danio pere de Gronlando.

Ĉi tiu kurioza, amuza kaj lernolibra ekzemplo pravas, ke diplomatio havas multajn formojn kaj manierojn solvi internaciajn disputojn. ■

1. La Konstanta Kortumo de Internacia Justico estis la unua tutmonda internacia kortumo. Ĝi estis fondita en 1920, dissolviĝis en 1946 kaj ĝin anstataŭis la hodiaŭa Internacia Kortumo de Unuiĝintaj Nacioj (UN).

KARTVELIO

Nekutima internacia virina tago



Tea **TURMANIDZE**
Kartvelio

Internaciaj amaskomunikiloj multe parolis pri la kartvelaj manifestacioj, kiuj okazis la 7an, 8an kaj 9an de marto. En Tbiliso, antaŭ la parlamento, amaso da homoj protestis kontraŭ la proponita leĝo pri „travidebleco de fremdaj influoj”. La parlamento aprobis leĝon devigantan ĉiujn organizaĵojn, kiuj ricevas eksterlandan financadon je pli ol 20 % de siaj enspezoj, registriĝi kiel „fremda agento”. Se ili ne plenumos tion, ili ricevos sankcion konsistantan el alta monpuno. Miloj da manifestaciantoj kriegis kontraŭ la registaro, la parlamento, la „putinistoj”, la rusoj kaj la „sklavoj”.

Ĉu „rusa” leĝo?

Kial tio okazis? En Rusio, ekde 2012, validas sama leĝo por apogi la subpremadon enlande. Komence ĝi



NINO GOGIDZE

Krom en Tbiliso, la 8an de marto en 13 aliaj urboj de Kartvelio okazis protestaj marŝoj sub la temo „Virinoj kontraŭ totalisma regado!”

aplikiĝis nur kontraŭ neprofitcelaj organizaĵoj, aktivistoj kaj amaskomunikiloj. Iom poste, ĝi etendiĝis kontraŭ ĉiuj, kiuj ne samopiniis kiel la registaro. La kartvela registaro asertas, ke ĝi similas al la usona leĝo FARA: en Usono, ekde 1938, estas aplikata leĝo pri „fremdaj agentoj”, origine aprobita



Oni jam longatempe perdis fidon al la jura sistemo kaj atendas profundajn reformojn rilate al ĝi

por batali kontraŭ la nazia propagando. Tamen en tiu leĝo la statuso de fremda agento tute ne estas ligita al la fonto de la enspezoj. Plie, en la FARA-datumbazo, ne eblas registri organizaĵojn sen iu pruvo pri agado laŭ la ordonoj aŭ sub la direktado de fremda ŝtato aŭ individuo.



En Tbiliso amaso da homoj protestis kontraŭ la proponita leĝo laŭ kiu ĉiuj organizaĵoj, kiuj ricevas eksterlandajn subvenciojn registriĝu kiel „fremda agento”.

NINO GOGIDZE

Eŭropunia aspirado

Eĉ se la kartvela versio similas al tiu de FARA, la problemo estas, ke oni jam longatempe perdis fidon al la jura sistemo kaj atendas profundajn reformojn rilate al ĝi. La popolo same atendas la plenumon de la kondiĉoj postulataj de Eŭropa Komisiono por ricevi la kandidatstatuson ĉe Eŭropa Unio. La postuloj rilatas al naturmedia protektado, batalo kontraŭ organizita krimularo, juraj reformoj, amaskomunikila libereco, demokratiaj reformoj, homaj rajtoj ktp.

Partoprenantoj en la protestoj

Inter la manifestaciintoj troviĝis opoziciuloj, junuloj, kiuj neniam akceptos vivon sen demokratiaj valoroj, maljunuloj, kiuj ne plu deziras revenon al rusa regado, la generacio, kiu ekde la disfalo de Sovetio batalas kontraŭ la rusa influo, la gefiloj de la miloj da soldatoj forpasintaj dum la militoj kontraŭ Rusio en Abĥazio kaj Sud-Osetio. Unu afero dum la manifestacioj, kiuj aparte notindas, estis la rapida, emocia kaj intensa

reago de gejunuloj. Tion antaŭvidis nek la registaro, nek la opoziciaj partioj. Simplaj junuloj permesis al la konataj opoziciaj politikistoj paroli per mikrofono nur mallongtempe antaŭ la ĉeestantaro, por ke ili ne monopolu la protestadon.

Neniu kontraŭmanifestacio

Estas tiuj, kiuj inklinas al alproksimiĝo kun Rusio. Tamen oni devas konstati, ke neniu kontraŭmanifestacio okazis, kaj ili tute silentis. La protestado denove montris, ke la kartvela popolo deziras preni la eŭropan vojon. La registaro kontraŭis ĝin uzante policveturilojn kun akvokanono, kaj pipran aerosolon. Tio igis, ke multaj homoj bezonis kuracajn zorgojn. Oni arestis pli ol centon da protestantoj. Krom en Tbiliso, la 8an de marto en 13 aliaj urboj de Kartvelio okazis protestaj marŝoj sub la temo „Virinoj kontraŭ

totalisma regado!”. Laŭ la partoprenantoj, la lando ricevas gravan subtenon de neregistaraj organizaĵoj, kaj la nova „rusa” leĝo damaĝos multajn ricevatajn servojn: por helpi kaj protekti la viktimojn de perforto, la loĝantojn en malriĉaj vilaĝoj, la migrantojn, la reprezentantojn de etnaj kaj religiaj minoritatoj, la maljunulojn, la perforte eldomigitajn virinojn, la fraŭlajn patrinojn, la gepatrojn de handikapitaj infanoj, la homojn vivantajn en konfliktozonoj ktp.

Moskvo malkontentas

La forto de la protestado igis, ke la 9an de marto la registaro nuligis la leĝproponon kaj liberigis la plimulton de la arestitoj. En Moskvo la ministro pri eksteraj aferoj Sergej Lavrov malkontentiĝis kaj komparis la situacion al tiu de Ukrainio en 2014, kiam en la centro de Kijivo la popolo protestis kontraŭ sia prezidento Viktor Janukoviĉ.

La proparolanto de la rusa malsupera ĉambro, Vjaĉeslav Volodin, rekte indikis, ke per tiu leĝo oni povintus kontroli eksterlandan financadon, kaj bedaŭris pri ĝia nuligo.

Ĉu Ukrainio kaj Kartvelio malsamas?

La franca prezidento, Emmanuel Macron, asertis, ke Eŭropa Unio ne povas disigi la situacion de Ukrainio kaj Moldavio, sed ke Kartvelio estas geopolitike malsama afero. Jes, ĝi malsamas, ĉar oni postulas, ke Kartvelio atingu pli altan nivelon de demokratio ol la aliaj novaj kandidatlanoj ĉe Eŭropa Unio. Fakte, nuntempe en suda Kaŭkazio Kartvelio estas la ununura lando, kiu forte batalas por pli da demokratio. Por la rusa registaro, tio tute ne estas plaĉa realo ĉe ĝia landlimo. ■



(Re)legu ankaŭ la artikolon de Tea Turmanidze *Malfacilas esti najbaro de potenca lando*, MONATO 2022/04, p. 25.



Tea TURMANIDZE estas profesia instruistino de nacia lingvo kaj literaturo.

Ĉu orient-afrikaj ĝemeloj kuniĝos?



Frédéric DÜE
Germanio/Ruando

Ekde 2000 en
orienta Afriko oni
denove konsideras unuigi
multajn landojn kadre
de la Orient-Afrika
Federacio.

Nord-okcidente de Tanzanio troviĝas Ruando kaj Burundo. Ambaŭ havas ĉefurbon en la geografia centro, ambaŭ posedas duonon de granda lago en la okcidento, eĉ montetoj abunde videblas en ambaŭ landoj. Se oni rigardas pli atente, tamen, eblas rimarki, ke la du landoj iras malsamajn vojojn.

Kontrastaj landoj

El politika vidpunkto komparo eblas kun la korea duoninsulo. Ruando (kiu tamen troviĝas norde) estas kapitalisma, rapide kreskanta, gastiganta multajn internaciajn – eĉ usonajn – universitatojn, multajn Neregistarajn Organizaĵojn (NRO), kaj grandajn investojn en la teknologia sektoro. La kreinto de la

Pfizer-vakcino, Biontech, planas starigi regionan fabrikon en Ruando.

Burundo, sude de Ruando, estas ekonomie pli fermita. Internacia agado plej ofte konsistas el helpo anstataŭ profitema investo, videblas pli da malsataj infanoj ludantaj sur teraj vojoj kun malmultaj aŭtoj. Anoj de la registara partio publike varbas homojn en la novan ĉefurbon, kiu estas multe malpli granda ol la ruanda: antaŭe la politika centro de la lando estis en Buĵumburo – okcidente apud la lago Tanganjiko.

En Kigalio, ĉefurbo de Ruando, motorciklo estas tiom grava kaj uzata veturilo, ke tie fondiĝis la firmao Ampersand, kiu fabrikas elektrajn motorciklojn. En la pasinteco, la eksĉefurbo de Burundo male entute malpermesis motorciklojn pro la troa danĝero. Nun en Buĵumburo estas multe da trafiko kaŭzata de kom-

pare grandaj aŭtoj, dum en Kigalio oni malkonstruas stratojn por ebligi senaŭtajn zonojn tra la urbo.

Ruando kaj Burundo havas proprajn valutojn. Unu burunda franko egalas al duona ruanda. La prezoj en Burundo estas malpli altaj ol en Ruando, kie ili estas interlaplej altaj de la regiono. Tiuaspekte la situacio iomete kompareblas al tiu inter la historia okcidenta kaj orienta Germanio.

Limo malfermiĝis

Historie la vojo de Ruando ege ŝanĝiĝis post la genocido de 1994. La Ruanda Patriota Fronto, kiu antaŭe sukcese agadis kontraŭ la tiama registaro, akiris la povon, kaj surprizis per rapida progreso kaj ekonomia malfermado cele al investado. La genocido ne rekte trafis Burundon, sed tie daŭre estis kontrastoj inter la etnaj grupoj hutuoj kaj tucioj. La celoj de Burundo

kaj Ruando ofte malsimilis, sed finfine pasintjare oni denove malfermis la limon inter Burundo kaj Ruando post preskaŭ sesjara fermiteco.

En 1990 Germanio ĝoje unuigis kaj eblas, ke tio okazos ankaŭ ĉe la du afrikaj ĝemeloj. Ekde 2000 en orienta Afriko oni denove konsideras unuigi multajn landojn kadre de la Orient-Afrika Federacio, projekto en kiu partoprenas ankaŭ – krom Ruando kaj Burundo – Tanzanio, Kenjo, Ugando, Sud-Sudano kaj Demokratia Respubliko Kongo. La reciproka malfermo de ilia limo fakte estas paŝo en tiun direkton. ■



Frédéric DÜE
studas en Ruando en
African Leadership
University en Kigalio.

VIENO

Novaj metro- kaj akvo-vojoj



Renate kaj Walter **KLAG**
korespondantoj de MONATO en Vieno



La tubo devas situi pli alte ol la supra kontaktlineo de la tramo, kio videbligas ĝin kvazaŭ ŝvebanta akvoduktego.

Vieno kreskas, kaj sekve ankaŭ la metroa reto devas kreski. En la jaro 2005 Vieno havis 1,6 milionojn da loĝantoj, en 2023 estos 2 milionoj. Nuntempe funkcias en Vieno kvin metrolinioj: U1, U2, U3, U4 kaj U6.¹

Nun konstruiĝas la nova linio U5. Samtempe plilongiĝos la ekzistanta linio U2. Por konstrui la subteran interkruciĝon de U2 kaj U5 necesas ampleksaj laboroj. Interalie oni devas forpumpi la grundakvon, kiu daŭre fluas en la konstruejan truegon. En cent putoj ĉirkaŭ la urbo-domo kolektiĝas grundakvo, kiu malebligas la konstrulaborojn en profunde

de 20 metroj. La akvo forfluas nun en provizora tubo unu kilometron longa kaj 60 centimetrojn dika. Tiu tubo troviĝas grandparte super la stratnivele, pli alte ol la supra kontaktlineo de la tramoj. Tra la tubo fluas maksimume 350 litroj da akvo en unu sekundo².

Vidindaĵo kaj rapideco

Turistoj havas nun du vidindaĵojn: rimarkindan kvazaŭ ŝvebantajn akvoduktegon kaj la iom enigman tramlinion U2Z.

Post la konstruado de la du linioj 30 % de la pasaĝeroj, kiuj uzas publikajn

trafikilojn en Vieno, venos pli rapide al la celo. Tiam la tubo malaperos. ■



Renate kaj Walter KLAG naskiĝis en Vieno. Ŝi studis tie la anglan lingvon, ekonomikon kaj geografion. Li studis tie fizikon kaj laboras nun kiel eldonisto kaj numismato. Ambaŭ laboras kiel ĵurnalistoj en Aŭstrio.



1. „U” signifas *Untergrund* (sub la tero), kvankam kelkaj vojoj situas parte sur aŭ super la stratnivele.

2. Tricent kvindek litroj estas la enhavo de unu aŭ du bankuvoj.

KONKURSO

Eŭropa premio por aŭstra vilaĝo



Julius HAUSER

korespondanto de MONATO en Slovakio

Multaj ne scias, ke jam de kelkaj jaroj oni povas sekvi la internacian konkurson kun la nomo „eŭropa premio por renovigo de vilaĝo”, kiu estas organizata ĉiun duan jaron ekde 1990 de Eŭropa Labor-kolektivo por Kampara Evoluo kaj Renovigo de Vilaĝoj¹. Intereson atingi la internacian eŭropan premion en 2022 havis 21 registritaj vilaĝoj kaj lokaj komunumoj el Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Finnlando, Germanio, Hungario, Nederlando, Pollando, Slovakio kaj Svislando.

1. Eŭropa Labor-kolektivo por Kampara Evoluo kaj Renovigo de Vilaĝoj (germane Europäische Arbeitsgemeinschaft Landentwicklung und Dorferneuerung) estis fondita en 1989 kiel unuiĝo de registaraj reprezentantoj, specialistoj kaj spertuloj pri kampara renovigo. Ekde februaro 2007 ĝi funkcias kiel sendependa neprofitcela organizajo.



C. STADLER/BWAG

La frapfrazo de la konkurso estis „Konstruado de pontoj”. Ĝi spegulas grandajn defiojn niantempajn, kiel ekzemple klimat-ŝanĝiĝon, mankon de financaj rimedoj, ciferecan transformon, pandemion ktp. Ĝi samtempe subtenas aktivan dialogon en diversaj vilaĝoj inter ties loĝantoj, kiuj serĉas komunajn elirpunktojn kaj trovas socie, ekonomie kaj ekologie respondecajn solvojn.

Venkinto

La prestiĝan 17an eŭropan premion atingis la aŭstra vilaĝo Stadtschlaining,

kiu havas proksimume 2000 loĝantojn. En la raporto de la esplorkomisiono estas skribite, ke la unika avantaĝo kaj escepta karakterizaĵo de la vilaĝo estas ĝia aliro al la temo pri paca kaj dankema kunvivado, kulturo kaj efika solvado de konfliktoj.

Krom realigo de multnombraj kaj sukcesaj sociaj projektoj, la vilaĝo Stadtschlaining elstaras ankaŭ pro sia ekzempla traktado de la valora historia strukturo de konstruaĵoj.

Aliaj partoprenintoj

La konkurantaj vilaĝoj estis dividitaj en tri kategoriojn. Krom la venkinta

vilaĝo Stadtschlaining, kvin aliaj atingis oran kategorion. Naŭ vilaĝoj ricevis arĝentan premion kaj ses vilaĝoj ricevis bronzan.

La solena ceremonio de transdono de premioj okazis en majo en la vilaĝo venkinta en la antaŭa jaro, la bavara Hofheimer Land en Germanio. ■



Julius HAUSER
estas emerita
ambasadoro
de Slovakio.

RUSIA INVADO

Ĉu novtipa komercado?



Alexander **MIKISHEV**
korespondanto de MONATO en Usono



La rusia
krozmisilo
9M727 enhavas
31 eksterlandajn
komponentojn.

La milito, kiun iniciatis Rusio kontraŭ Ukrainio, detruis multon, interalie la interlandan komercadon kaj partnerajn rilatojn inter kompanioj. La listo de ekonomiaj sankcioj kontraŭ Rusio, kiujn lanĉis Usono, Eŭropa Unio kaj kelkaj aliaj landoj, konstante kreskas. Ekde la jaro 2014 EU kaj Usono malpermesas eksporti al Rusio produktojn, kiujn eblas uzi kaj civilcele kaj militcele. Multaj kompanioj foriris de la rusia merkato, tamen ne ĉiuj. Kelkaj kompanioj trovis alternativajn komercvojojn, ekzemple, tra Kazahio aŭ aliaj aziaj landoj.

Malgraŭ la sankcioj ili daŭre havas reprezentantojn en Rusio. Ekzemple, en la retpaĝoj de la usona multnacia kompanio *Analog Devices* (kiu okupiĝas pri duonkonduktantoj) eblas trovi la nomon de ĝia reprezentanto en Rusio.

Elektronikaĵojn al Rusio!

La prestiĝa brita ideobredejo RUSI¹ publikigis raporton pri tio, ke pli ol 450 eksterlande produktitajn komponentojn oni trovis en rusiaj armiloj uzitaj en Ukrainio. Tio pruvas, ke ĝis nun oni ŝtelmaniere importas tra triaj landoj plurajn elementojn. Certe la plimulto de la trovitaj komponentoj estis produktitaj antaŭ la milito, sed troviĝas ankaŭ aliaj pli freŝaj.

Ekzemple, la rusia krommisilo 9M727, kiu povas manovri ĉe malgranda alteco evitante radaron kaj celante objektojn centojn da kilometroj for, enhavas 31 eksterlandajn komponentojn. Plimulto el tiuj

1. RUSI: *Royal United Services Institute* (Reĝa Instituto pri Armeaj Aferoj).



La milito, kiun iniciatis Rusio kontraŭ Ukrainio, detruis multon, interalie la interlandan komercadon



Pli ol 450 eksterlande produktitajn komponentojn oni trovis en rusiaj armiloj uzitaj en Ukrainio

komponentoj estas produktita de la usona *Texas Instruments*, kiu agadas en la rusia merkato ekde 2001, kaj malgraŭ peto de Ukrainio, en 2014 ĝi plu agadis. Nur aŭguste de la pasinta jaro (ses monatojn post la komenco de la milito) *Texas Instruments* ŝanĝis sian politikon pri la distribuado de siaj produktaĵoj en Rusio.

Multflanka helpo al Ukrainio

Nun *Texas Instruments* aliĝis al la listo de usonaj kompanioj subtenantaj Ukrainion kaj donacas al Amerika Ruĝa Kruco subvenciojn de 25 000 dolaroj por humanitara helpo en la lando. En tiu listo troviĝas la plej konataj usonaj kompanioj, kiel *Apple*, *AstraZeneca*, *Bank of America*, *Cisco*, *DuPont*, *Fedex*, *General Motors*, *Mastercard* kaj multaj aliaj. ■

INTERVJUO

Italio kaj ĝia lingva mozaiko



Tommaso MELACOTTE
korespondanto de MONATO en Italio



MARCO TAMBURELLI

Marco Tamburelli [marko tamburelli] estas profesoro ĉe la Universitato de Bangor en Kimrio, kie li plenumas esploradon kaj instruadon pri dulingvismo, fonologio kaj lingvistiko. Li magistriĝis ĉe *University College London*, kie li ankaŭ doktoriĝis en 2005, defendante disertacion pri sintaksa evoluo ĉe dulingvaj individuoj. Post tiam li komencis direkti sian intereson al regionaj idiomoj. Krom sia laboro pri pluraj universitataj esplorprojektoj, Tamburelli estas scienca ano de *Comitato della Salvaguardia dei Patrimoni Linguistici* (Komitato pri Protektado de Lingvaj Heredaĵoj), kiu naskiĝis en 2013 kun la celo sentemigi la publikon kaj diskonigi la konservadon kaj la heredaĵon de la pluraj lingvaj realaĵoj de nuna Italio.

MONATO: *Kiel via sperto en la fako de lingvistiko, same kiel via zorgemo kiel aktivulo, naskis kunlaboradon kun la Komitato pri Protektado de Lingvaj Heredaĵoj?*

Tamburelli: Mi estas unu el ties fondintoj. Ĝi naskiĝis el fejsbuka grupo kontraŭa al serio da televid-anoncoj misinformantaj rilate al italaj lingvaj minoritatoj kaj dialektoj. Tiuj specifaj reklamfilmetoj, oficiale celantaj lingvan unuigon (kaj havantaj sume rilaton

kun aprobinda projekto), estis fakte favoraj al unulingva unuecigo, kiu estas tute malsama afero. Ŝtatoj povas esti lingve unuigitaj sen turni sin al unulingveco. La grupo fariĝis poste la nuna komitato. Unu el niaj specialaj trajtoj estas baziĝi sur sciencaj starpunktoj, anstataŭ limigi nin je amatoreca movado. Mi fondis la komitaton, kiam tiu ĉi temo jam konstituis grandan parton de mia esplorkonferenco, kiun mi komencis en 2010.

”

Ĉiu nacio-ŝtato ĝenerale klopodas agnoski kiel eble plej malmultan lingvan diversecon, ĉar ĝin ĉiam interesas la kreado de unulingva unueco

MONATO: *Kvankam la itala leĝaro agnoskas 12 historiajn lingvajn komunumojn, ĝi rifuzas doni tiun rekonon al lokaj variaĵoj de kelkaj idiomoj aŭ al regionaj lingvoj. Kiuj estas, laŭ vi, la kulturaj kialoj malantaŭ tiu ĉi diskriminacio?*

Tamburelli: Estas du ĉefaj motivoj por tiu ĉi distingo. Unue, ĉiu nacio-ŝtato ĝenerale klopodas agnoski kiel eble plej malmultan lingvan diversecon, ĉar ĝin ĉiam interesas la kreado de



WWW.LINGUEDIALETTI.IT

”

La unua vidpunkto naskiĝis dum la faŝista periodo: dialektoj estas herbaĉo, kiun ni devas forigi. La dua vidpunkto komprenas, ke t.n. dialektoj de la itala estas tute malsamaj ol la itala

unulingva unueco. Historie naciisma retoriko antaŭiras unulingvecon, kiu fakte naskiĝas poste. Francio, ekzemple, sukcese mortigis siajn regionajn lingvojn: la okcitana lingvo estas esence forpasinta kaj nur lastatempe transiras renaskiĝan periodon. Esti unulingva lando ĉiam konstituis fundamenton por la nacio-ŝtatoj, kaj kiam tiu ĉi kondiĉo estas minacata, tio estigas problemon. Ĉiam ekzistis eksterlandaj premoj, sed multaj el ili naskiĝas nur kun la celo agnoski propran kulturon ene de najbaraj landoj, kaj tio rekonigas en Italio

kelkajn lingvojn kiel la al-bana kaj la greka. La dua faktoro, kaj politika kaj kultura, estas la orientiĝo de la itala lingvistiko, kiu kutime interpretas ĉiun latinidan variaĵon – tio estas idiomon, kiu devenas el la latina lingvo – en Italio kiel subtipologion de la itala. Eĉ la koncepto mem pri italo-latinida lingvo, kiu lingvistike tute ne havas sencion, estas politika etikedo lingvistike nedifinebla, kaj la precipa problemo en Italio pri ĝi, kompare kun aliaj landoj, koncernas ĝian izogloson.

MONATO: *Kio estas izogloso?*

Tamburelli: Izogloso estas lingva limo. Ekzistas pluraj gravaj izoglosoj en la latinida mondo, sed la plej grava kaj notinda estas la izogloso „Massa Carrara” [masa karara]. Ĝi dividas nian duoninsulon, kaj tio estas ideologie malkomforta laŭ multaj homoj. Pli norde ol tiu limo ekzistas fonologiaj kaj sintaksaj trajtoj, kiuj komunigas Emilio-Romanjon, Lombardion, Veneton, Francion, Hispanion kaj Portugalion,

dum pli sude ol tiu limo ni trovas trajtojn, kiu komunigas la italan, la rumanan, la sicilian kaj la napolan. Tio ja estas la dividlinio inter la okcidenta kaj orienta latinida lingvaro; kaj, kvankam ĝi estas lingvistike objektivaĵo, oni faris ĉion eblan por etigi tiun fakton, timante tion, kion ĝi povus politike kaŭzi por la unueco de la lando. Lingvistika analizo ja ne povas inkluzivi socian interpretadon de fenomenoj: tio estus politika konsidero, kiu generas ambiguecon kaj konfuzon. Simile okazis en frankisma Hispanio, kie la kataluna kaj la eŭska lingvoj estis konsiderataj kiel dialektoj de la hispana.

MONATO: *Ĉu tio povas havi identecajn konsekvencojn? Kiel varias la apartenento de popoloj en geografia zono rilate al propra lingvo?*

Tamburelli: Ne neceso ekzistas kunrilato inter popola identeco kaj lingva rekono: la hispana situacio estas evidenta ekzemplo pri tio. La galega kaj la kataluna ambaŭ estas vidataj kiel regionaj lingvoj, kaj, kvankam ni konas la grandan identecan senton de Katalunio, en Galegio la sendependisma partio estas praktike neekzistanta. Kvankam laŭ la nacio-ŝtatoj tiu sento povas esti minaca, ne ekzistas rilato: la galegoj havas propran lingvan identecon, sed tendence ili ne elmontras tiun senton kontraŭstare al Hispanio. Same en Frislando, kie la frisa lingvaro estas agnoskata de Neder-

lando kaj sendependista movado estas neekzistanta.

MONATO: *En la internacia panoramo ekzistas la Eŭropa Ĉarto pri Regionaj kaj Minoritataj Lingvoj, kiu ekvalidis la 1an de marto 1998 kaj estas subskribita de Italio ekde la 27a de majo 2000. Kio malpermesis ĝian aplikadon?*

Tamburelli: Tiu ĉarto ekaperis kun la celo agnoski lingvajn minoritatojn por protekti popolojn kaj kulturojn kaj por konservi nian lingvan malsamecon. Ĝi tamen permesis rekonii idiomajn bazitajn sur tiuj lingvoj, kiuj estas jam parolataj en aliaj ŝtatoj, en ia speco de komplezo inter landoj. Laŭ mi, nenio ŝanĝiĝis, ĉar, kvankam oni eĉ asignis monon favore al kelkaj projektoj, tiuj neniam aplikigis al gravaj vehiklaj lingvoj, kiel la menciitaj galega kaj kataluna. Estas multo farenda, kaj la problemo estas la deziro „allasi” ion al tiuj lingvoj pli ol agnoski ilin definitive kaj oficiale. Aldone, la Konsilio de Eŭropo subskribigis tiun ĉarton, lasante al la membroŝtatoj la finan decidon, kiujn idiomajn agnoski. Ĉiu ŝtato rekonis kiel eble plej malmulton kaj tiel igis la ĉarton fakte neutila.

MONATO: *Estas interesa la temo de la itala regiono Trentino-Supera Adigo (Sud-Tirol). Ĝia statuto sole proklamas la egalecon de rajtoj por tiuj civitanoj, kiuj apartenas al la specifaj kaj variaj lingvaj grupoj. Ĉu vi*

opiniis, ke regionaj situacioj povus agi loke favore al iliaj lingvaj minoritatoj?

Tamburelli: Pri tiu nord-itala regiono apud Aŭstrio mi publikigis kelkajn verkojn kune kun aliaj studentoj, kiuj tie faris esploradon. Ankaŭ en tiu okazo la ideologio mas-tras laŭplaĉe, kiel en Italio. Trentino-Supera Adigo estas konsiderata dulingva lando, kie oni parolas la italan kaj la germanan, sed tiu idiomo, kiun oni parolas en Sud-Tirol, estas ne la germana, sed ĝia variaĵo: la bavara. En niaj verkoj ni konstatis, ke nur 60 elcentoj de tiu lingva variaĵo kongruas kun la germana. La lingvaĵon en tiu areo oni povas difini laŭ la Unesko-atlaso de endanĝerigitaj lingvoj, kaj ĝi unuigas la areojn inter Bavario kaj Aŭstrio, ĝis kelkaj zonoj de Svislando. Ni denove parolas pri ideologio, ĉar ni fakte havas trilingvisman situacion, sed la bavara ne estas agnoskata, favore al la germana.

MONATO: *Kadre de via vulgariga aktivado, kiu estas, laŭ vi, la vidpunkto de la homoj pri lingvoj kaj dialektoj? Kiuj estas la malfacilaĵoj pri ebla renovigita percepto de minoritataj lingvoj?*

Tamburelli: Estas du kutimaj opinioj pri tiuj ĉi aferoj, kaj mi fakte estas verkanta pri tio en ĉapitro de libro, kiu estos publikigita ĉi-jare. La unua vidpunkto naskiĝis dum la faŝista periodo: dialektoj estas herbaĉo, kiun ni devas forigi.

”

Nun ni laboras kun lokaj asocioj sen profita celo, kiuj klopodas konservi sian lingvan posedaĵon

Tio pligrandigis ideon, kiun proponis la itala verkisto kaj poeto Alessandro Manzoni. La plej granda parto de la homoj, tiel pensante, deziris liberigi sin de tiuj lingvaj kriplajoj. Bonŝance ŝajnas, ke dum la lastaj 15 jaroj tiu opinio laŭgrade malkreskis. La dua vidpunkto – kaj la plej lingve konscia – komprenas, ke t.n. dialektoj de la itala estas tute malsamaj ol la itala (ili ja estas paralelaj, malsamaj, rektaj idoj de la latina), sed ankoraŭ ne vere kredas, ke ili estas efektivaj sendependaj lingvoj. Certe ĉi tio estas progreso, kaj ankaŭ el tiu ĉi flanko la komitato multon faris dum la jaroj. Eĉ nun ni laboras kun lokaj asocioj sen profita celo, kiuj klopodas konservi sian lingvan posedaĵon.

MONATO: *Ĉu estus ĝuste aserti, ke fakte malĉeestas la intenco protekti la lingvajn minoritatojn kadre de la itala leĝfarado?*

Tamburelli: Precipe en Eŭropo oni konsideras lingvojn legitimaj nur tiam, kiam ili havas proprajn literaturon, vortaron, kaj se ili estas uzataj de ŝtato,

produktante kontraŭdiran duoblan normon: italaj lingvistoj certe uzos la vorton „lingvo” por idiomoj de indianoj aŭ por la nenombreblaj lingvoj de Papuo-Nov-Gvineo, sed uzos la vorton „dialekto” por indiki la sicilian, la napolan kaj la lombardan lingvojn, ĉar estas opinio, ke ĉi-lastaj ne posedas la politikan aŭ la sociolingvistikajn povon por esti „oficialaj” lingvoj. Tio generas ian lingvan kontraŭdiron senan je scienca fundamento, kaj tio aspektas evidenta, kiam ni ne plu pritraktas lingvaĵon kaj komencas paroli el politika kaj socia perspektivo. Mia akademia lernado devenas de psikolingvistiko, kiu estas rigore scienca disciplino, kie la konceptoj estas klare difinitaj, kaj, se la mezurado ne koincidas kun la difino, oni devas ŝanĝi ĉi-lastan: la konkreta fenomeno antaŭiras la teorion, kiu devas progresi kune kun la evoluo de fenomenoj. Ene de tiuj svagaj konceptoj mi trovis min en retorika kaj antaŭjuĝa labirinto, kie malmultaj homoj taksas lingvistikon science, ĉefe en Italio. ■



Tommaso

MELACOTTE estas universitata studento kaj ĵurnalisto, kiu kunlaboras kun italaj lokaj gazetoj kaj asocioj.

ESEO

Apologio pri mia vivo



Garbhan MacAoidh
korespondanto de MONATO en Irlando

Estimataj gelegantoj, ĉar mi estas konata al tre limigita nombro da personoj, mi decidis, ke mi provu prezenti min per ĉi tiu medio al la legantaro de MONATO, rakontante ion pri miaj lingvaj spertoj.

Unue, pri mia familia nomo: laŭ populara etimologio, ĝi signifas en la prakelta lingvo „Filo de fajro”; kio eble estis taŭga priskribo de miaj sovaĝaj prapatroj, sed ne de mi. Fajra mi ne estas; filo, jes ja.

Grandan parton de mia vivo kiel verkisto regis du tute malsimilaj lingvoj, nome dum kvardek jaroj la gaela lingvo de Skotlando, la lando de miaj gepatroj; kaj dum tridek kvar jaroj Esperanto, kiun mi komencis

lerni en Hispanio kaj rekomencis studi en Irlando.

Mondmilitoj

Mi naskiĝis, danke al mia kara skota patrino, en la jaro 1929, tio estas – se mi ĝuste kalkulas – dek unu jarojn post la fino de la unua mondmilito, kaj dek jarojn antaŭ la eko de la dua. Pro tio, ĉi-jare (2023), mi festos la atingon de la respektinda aĝo de 94: alivorte restas nur ses jaroj, por ke mi atingu la statuson de centjarulo (se mi iam efektive atingos ĝin). Do eble baldaŭ mi devos pretiĝi por mia cignokanto!

Rigardante retrospektive, antaŭ iom pli ol tridek jaroj (en 1991), mi subskribis kontrakton kun Stefan Maul por kunlabori kun lia magazino MONATO. Sed tio ne estis mia unua sperto kiel kontribuanto al iu revuo. Fakte mi sendadis miajn skribaĵojn (kiuj ne ĉiam es-

”

La vivo staras sur la karto. L.L. Zamenhof, Proverbaro Esperanta

”

Legantoj permesu, ke mi rakontu, kiamaniere mi komencis verki en la gaela

tis akceptataj) al eldonaĵoj en diversaj landoj, kaj ne ĉiam en la du menciitaj idiomoj.

Koka krio

Legantoj permesu, ke mi rakontu, kiamaniere mi komencis verki en la gaela. En la jaro 1952, du kolegoj en la Universitato Glasgovo fondis literaturan revuon kaj eldonejon de libroj en la gaela, kiujn ambaŭ ili nomis GAIRM. La signifo de tiu nomo estas „(koka) krio” en la gaela, t.e. ilia denaska lingvo. La revuo estis akirebla kaj en broŝura kaj en bindita formo. Unu el la fondintoj, nome Ruairidh MacThòmais, kiu estis unu el la plej renomaj poetoj, lertuloj kaj aŭtoroj en la gaela, finfine okupis la katedron pri keltaj kaj gaelaj studoj en la Universitato Glasgovo. De la fondiĝo, okazinta en 1952, de la revuo GAIRM ĝis 2012, kiam li forpasis kaj

la revuo ĉesis aperi, profesoro MacThòmais estis ĝia konstanta redaktoro.

Dum la duonjarcenta ekzisto de *GAIRM* estis neniu grava aŭtoro aŭ renoma poeto en la gaela, kies verko ne aperis iam sur la paĝoj de tiu revuo. Kaj prozo kaj poezio estis eldonataj. Mi estas nek grava aŭtoro nek renoma poeto, sed MacThòmais afable bonvolis publikigi miajn skribaĵojn. Li rifuzis preskaŭ neniun el ili. La verkoj miaj, kiuj estis eldonataj en *GAIRM* de 1960 ĝis 2001, estis precipe: eseoj pri lingvoj, literaturo, informadiko, turismo, aliaj landoj kaj interesaj lokoj; fikciaj rakontoj; enkonduko al astronomio; enkonduko al Esperanto; unu novelo en felietono; aŭtobiografio; originala poezio; kaj tradukoj en la gaelan de poemoj el naŭ lingvoj.

Luksa volumo

Iom pli ol dudek jarojn post la malapero de la

menciita revuo, grupo de kolegoj en la Universitato Glasgovo rekonis, ke ĝi estas ne nura revuo, sed ankaŭ valora trezoro pri la kelta kulturo. Ili konsideris, ke la eldonaĵaro (200 numeroj entute) konstituas gravan literaturan verkon, kiu ne estu forgesita. Pro tio la Universitato Glasgovo presis grandan 676-paĝan lukse binditan volumon kun la titolo *Gairm – Aŭtoroj kaj Bildoj ...*, kiu enhavas mallongan historion de *GAIRM*, sed kies plej longa parto konsistas el listo de kontribuantoj kaj titoloj de la respektivaj verkoj.

Miaj konatoj certe ne povas kompreni, kial mi (maniulo) malŝparis kvardek jarojn de mia vivo verkante en la antikva skota lingvo, parolata de ĉiam malaltiĝanta nombro da homoj; kaj tridek tri jarojn verkante kaj uzante „artefaritan/planan” lingvon, kiu ne sukcesis plenumi la celon („finan venkon”) de sia kreinto.

”

Mi insiste plu uzas la skot-gaelan pro la fakto, ke ĝi estas unu el la multvaloraj endanĝerigitaj idiomoj, kiuj antaŭ nelonge estis persekutataj, malpermesataj kaj malestimataj

Paranojuloj

Jen mallonga klarigo pri mia verkado en lingvo uzata de eta minoritato. Dum la tuta historio de la homaro estis arogantuloj, imperiestroj kaj paranojuloj, kiuj ne volis permesi, ke aliuloj parolu sian gepatran lingvon aŭ transdonu ĝin al siaj infanoj. Ekzemple: Francisco Franco, kiu malpermesis la katalunan en Hispanio; Benito Mussolini, kiu malpermesis ĉiun ajn lingvon krom la itala; la blankuloj en Nord-Ameriko, kiuj ekstermis multajn indiĝenojn kaj iliajn lingvojn; kaj lastatempe Vladimir Putin, kiu ne volas, ke la ukrainoj parolu la propran lingvon (aŭ eĉ ekzistu).

Mi insiste plu uzas la skot-gaelan pro la fakto, ke ĝi estas unu el la multvaloraj endanĝerigitaj idiomoj, kiuj antaŭ nelonge estis persekutataj, malpermesataj kaj malestimataj. Mi opinias, ke tio ja estas taŭga kaj inda motivo! ■




“**Naturista Vivo**”, la ilustrita revuo por nudistoj/naturistoj/nudnaĝantoj. Belaj koloraj fotoj. Senpaga prov-ekzemplero.

La revuo aperas 4-foje jare, sur 16 paĝoj.

Internacia Naturista
Organizo Esperantista.
Adreso: József Németh, HU-8531
Ihász, Fő u. 41/5.
Rete: jozefo.nemeth@gmail.com.

AKVA KRIZO

Ebla respondo al niaplaneda krizo pri nesala akvo



Kelkaj vastaj zonoj de la mondo alfrontas gravan mankon de nesala akvo.



Juan Carlos MONTERO MEDINA
korespondanto de MONATO en Kubo

I AM ADVENTURE / SHUTTERSTOCK.COM

Kiel estas sciite, kelkaj vastaj zonoj de la mondo alfrontas gravan mankon de nesala akvo. Oni antaŭkalkulas, ke tio pliiĝos pro la kreskanta mondloĝantaro, ekonomia kresko kaj adaptiĝo al tutmonda klimatsanĝiĝo. La aktuala aliro por pritrakti tiun ĉi egan defion bedaŭrinde baziĝas sur la ideo, ke necesas pliiĝi la efikan uzon de la ekzistantaj resursoj, kvankam la disponeblo de nesala akvo rapide malkreskas pro troa ekspluatado kaj klimatsanĝiĝo. Do estas neverŝajne, ke la estontaj bezonoj estos daŭripove kontentigataj,

kio postulas rekonsideri la nunajn solvojn.

Multaj akvofontoj, kiel lagoj, riveroj kaj grundakvoj, estas poluataj pro homa agado. La reciklado kaj reuzado de akvo rimarkinde sukcesis, sed ĝia grandskala uzeblo estas limigita – la tradiciaj rimedoj por produkti nesalan akvon, kiel inversa osmozo kaj distilado, multekostas kaj konsumas multe da energio. Grundakvon oni ĉerpas multe pli ol ĝi renoviĝas, kaj la subtera akvotavolo falas je alarma nivelo en tiuj regionoj, kie nesala akvo estas plej bezonata. La neĝotavoloj kaj glaĉeroj taŭĝaj kiel akvofontoj malpliiĝas aŭ retroiras pro klimatsanĝiĝo,

kaj degelo ofte okazas antaŭ printempo.

La nuna situacio starigas grandan defion por la homaro bezonanta solvon aŭdacan kaj tujan. Pro tio estas esence trovi portebajn solvojn – simplajn kaj etkostajn – por produkti sensalan akvon en diversaj ĉirkaŭaĵoj.

Solvoj por akiri akvon urĝe bezonatas, ĉirkaŭ du miliardoj da homoj loĝas en areoj suferantaj pro akvomanko, kaj tiu ĉi kvanto povos pliiĝi laŭ tio, kiel klimatsanĝiĝo plioftigas trosekecojn.


Propono

Sciencistoj el Preria Esplorinstituto (angle *Prairie*


Research Institute) ĉe la universitato de Ilinojso ĉe Urbana-Champaign prezentis novigan aliron por pritrakti la kreskantan problemon de manko de nesala akvo en kelkaj regionoj sur nia planedo.

Fakuloj rekomendas ellabori infrastrukturon kapablan akiri akvovaporon el la oceanoj, tiel ebligante produkti nesalan akvon. Per tiu akvofonto ankoraŭ ne ekspluatata oni povus garantii provizadon „preskaŭ senliman” de tiu ĉi likvo tre multvalora.

Profesoro Praveen Kumar, gvidanto de tiu esplorstudado, asertas, ke la malabundo de nesala akvo iĝas „problemo tutmonda [...]”.



Bildo 1. Skemo de la koncepto proponita por akiri humidon super la oceansurfaco kaj ĝin porti al la proksima tero. Humidfluo vaporigita estas akirebla per enirejo konceptita, kiel montrite dekstre. Portate kiel akvovaporo per tubaro kaj kondensate tere, kiel estas ilustrite maldekstre, el la humidfluo formiĝas sensala akvo. Kompresoro povas pligrandigi la efikecon dum akirado de humidaera maso ĉe la enirejo. Renovigebla energio (venta aŭ suna) povas nutri la enigon, transportadon kaj kondensadon de la humida aero.



Bildo 2. La situo de 14 lokoj studitaj super la oceanoj pli proksimaj al setlejo estas prezentata sur mapo de akvomanko.

Tamen en la subtropikaj zonoj la apudaj oceanoj konsstante vaporigas marakvon, ĉar estas sufiĉa sunradiado pro tre malgranda nubokovrado la tutan jaron.”

La koncepto proponata konsistas en ideo kapti akvovaporon atmosfere

troviĝantan tuj super la oceansurfaco kaj porti tiun ĉi aeron humidoŝarĝitan al la proksima tero, kie ĝia kondensiĝo liveras nesalan akvon (vidu bildon 1).

La ĉirkaŭaĵoj apudaj super la oceansurfaco havas altan humidon, ĝiaj variaĵoj

ĉiutagaj kaj sezonaj estas influataj ĉefe de la oceansurfaca temperaturo kaj la supra aero. Tial ke tiu ĉi humido en la atmosfero rezultas el natura vaporigado de la oceanakvo, ne aperas nocaĵ kromproduktoj por la medio.

Kie la sciencistoj esploris?

Dum la esplorado oni taksis tutmonde 14 lokojn kun mankantaj precipitaĵoj por determini, ĉu efektiveblas la hipotezo strukturo kapabla akiri akvovaporon super la oceanoj kaj ĝin kondensati al nesala akvo.

Bildo 2 montras la situon de la lokoj taksitaj dum la esplorado kaj iliaj pli proksimaj oceanoj aŭ maroj sur mapo de akvomanko. Jen ili: Barcelono (Baleara Maro), Romo (Mediterraneo), Tripolo (Mediterraneo), Telavivo (Mediterraneo), Lisbono (Atlantika Oceano), Losanĝeleso (Pacifika Oceano), Valparaiso (Pacifika Oceano), Mekao (Ruĝa Maro), Durbano (Hinda Oceano), Perto (Hinda Oceano), Daŭho (Persa Golfo), Abudabio (Persa Golfo), Karaĉio (Araba Maro), Ĉenajo (Bengala Golfo).

La rezultoj de la plenumita esplorado montras, ke ekzistas signifa potencialo por produkti nesalan akvon pere de la oceanoj proksimaj al la marbordoj de regionoj alfrontantaj akvomankon. La teamo kontrolis la donitaĵojn pri humido dum la jaroj de 1990 ĝis 2019 por analizi la akvovaporon disponeblan en diversaj lokoj, elektitaj por prezenti klimatajn variaĵojn, kiuj troviĝas ne for de grandaj setlejoj, kiuj siavice situas proksime de oceanoj.

Realigeblo

La sciencistoj faris analizojn atmosferajn kaj pri ekonomia realigeblo por montri la profiton de tiu proponata koncepto. Oni diras, ke vertikala „kapto-surfaco” 210 metrojn larĝa kaj 100 metrojn alta respondanta proksimume al la areo projekciita vertikale de granda krozoŝipo povas liveri sufiĉan kvanton da humido por kovri averaĝe la ĉiutagajn bezonojn pri sensala akvo de proksimume 500 000 homoj. Tiujn ĉi dimensiojn oni arbitre elektas, kaj en ĉi artikolo per ili oni ilustras, ke la potenciala kvanto da akvo ĉerpata povas esti signifa. Espereble la reala efektivigo ampleksas varion signifan de tiuj dimensioj surbaze de la lokaj kondiĉoj. Oni konkludis, ke la taksita rendimento povus liveri nesalan akvon al grandaj setlejoj en subtropikaj areoj.

La strukturojn proponatajn oni starigus plurajn kilometrojn for de la marbordo por maksimumigi ilian kapablon akiri akvovaporon, kiun oni sendus per tubaro teren, kie ĝi kondensiĝus al nesala akvo.

„La aktualaj zonoj suferantaj pro akvomanko probable iĝos eĉ pli sekaj estontece, tiamaniere la problemo pliakriĝos”, certigis profesoro pri atmosferaj sciencoj Francina Domínguez. Tiel, dum la senĉesa tutmonda klimatsanĝiĝo, tiu propono estas daŭre realigebla.

„La klimataj prognozoj montras, ke la oceanvapora fluo nur pliiĝos kun la paso de tempo, provizante eĉ plian akvon, do la ideo de ni proponata estos farebla dum klimatsanĝiĝo”, atentigis la kunaŭtorino Afeefa Rahman. La esplortrovaj estis ĵus diskonigitaj en la prestiĝa naturscienca revuo *Nature Scientific Reports*.

Financa fareblo

La supozebla kosto fabriki instalaĵojn por ricevi kaj kondensi akvovaporon estas 600 milionoj da dolaroj, aŭ proksimume la kosto konstrui grandan krozoŝipon aŭ petrolplatformon. Supozeble 500 000 homoj profitos de tiaspeca instalaĵo, do oni povas certigi, ke ĉi kosto validas kompare kun la kosto de sensaligejoj.

Ideo revolucia

„Unu el la trajtoj pli elegantaj de la proponata solvo estas, ke ĝi funkcios kiel natura akvociklo. La diferenco kuŝas en tio, ke ni povas direkti la akvon vaporigitan el la oceanoj”, notis Francina Domínguez. „Kiam doktoro Praveen turnis sin al mi kun tiu ideo, ni ambaŭ scivole demandis nin, kial neniu pripensis tion antaŭe, ĉar ĝi ŝajnas solvo tiel evidenta. La sciencistoj koncentriĝis je solvoj bazitaj sur tero, sed nia studo montras, ke ekzistas aliaj opcioj.” Esence tiu ĉi aliro imitas la naturan fizikan procezon de la hidrologia ciklo, per kiu



Akiri humidon sur oceansurfaco estas solvo realigebla por multaj regionoj alfrontantaj akvomankon

igadi akvon el akvofontoj ne sufiĉos por kovri la bazajn homajn bezonojn. Ni opinias, ke nia metodo ĵus proponita povas grandskale plenumi tion”, konkludis Praveen Kumar.

Sensaligo ludis tre gravan rolon por akiri sensalan akvon, sed ĝi alfrontis defion rilate al siaj reziduoj, rezulte aperas peklakvo (salsolvaĵo), kiu povas iĝi toksa por la sovaĝa vivo.

Konkludoj

Post la menciita esplorstudado oni povas resumi, ke akiri humidon sur oceansurfaco estas solvo realigebla por multaj regionoj alfrontantaj akvomankon, la akvorendimento taksita de la strukturoj proponitaj povus mildigi la akvobezonojn de grandaj setlejoj en la subtropikaj zonoj.

La proponatan koncepton oni povus uzi kiel ansataŭaĵon aŭ por kompletigi la produktadon de sensala akvo la tutan jaron. ■

la humido vaporigita el oceano portiĝas teren, fridiĝas kaj kondensiĝas, kaj poste ĝi falas kiel precipitaĵo sur la tersurfacon, krom ke oni proponas krei la vojonojn, tra kiu la vaporigita humido moviĝas.

Doktoro Praveen Kumar aŭguris ankaŭ, ke „se ĉi koncepto realiĝos, ĝi povos esti medie pli racia kompare kun aliaj akvosolvoj”.

„Laŭ fakuloj, la antaŭaj teknikoj por recikligi grizakvojn, de nubosemado (artefarita pluvo) kaj sensaligo, sukcesis limigite. Nun ni akceptu la defion kaj trovu manieron por pliigi la provizadon de nesala akvo, ĉar konservadi kaj recikl-



Juan Carlos Montero MEDINA estas kuba emerita kontisto, loĝanta en Havano.

VIDATE SCIENCISTE

Kiel la mondo reale funkcias



Roland **ROtsaert**
korespondanto de MONATO en Belgio



DAVID LIPNOWSKI / UNIVERSITATO DE MANITOBO

Vaclav Smil verkis ĉefe por sciencista publiko. Tamen, liaj lastaj libroj *Numbers Don't Lie* el 2020 kaj la ĉi tie pritraktata *How the World Really Works* el 2022 celas ĝeneralan publikon.


Antaŭ kelkaj jaroj (MONATO 2020/05, p. 21) mi finis artikolon per la rimarko „Multe pli ol klimatsanĝigon mi timas fatalan kolapson de la monda financa sistemo kaj trian mondmiliton”. La tekston mi verkis jam fine de 2019, kaj tiam mi ne pensis pri alispeca katastrofo, pandemio, kiu grave perturbis la mondon je la aperdato de

mia artikolo. Jam delonge mi sentas min malbone informita pri la reala situacio de la mondo. Tial mi ĝojis aŭdante pri libro, kies aŭtoro asertas priskribi la problemojn el pure sciencista vidpunkto kaj refuti ĉiuspecajn misinformojn.

Vaclav Smil naskiĝis en 1943 en Plzeň en la nuna Ĉeĥio. En 1969 li elmigris kun la edzino al Usono. Ekde 1972 ĝis la pensiigo, li instruis sciencajn fakojn

ĉe la Universitato de Manitobo en Kanado. Li specialiĝis i.a. pri energio, klimatsanĝigo, Ĉinio kaj demografio kaj verkis multajn librojn kaj artikolojn pri tiuj temoj. Li estas skeptika pri la promesoj, ke ene de kelkaj jardekoj la tuta mondo povos funkcii per renoviĝanta energio.

Smil verkis ĉefe por sciencista publiko, kaj porbone kompreni liajn tekstojn leganto bezonas sufiĉan ko-



Kovrilo de „Kiel la mondo reale funkcias”.

Vaclav Smil: *How the World Really Works*, 2022. ISBN 978-0-241-98967-8. Ekzistas tradukoj al germana, hispana, nederlanda kaj portugala. Pliajn informojn pri la aŭtoro kaj lia laboro eblas ĉerpi el <https://vaclavsmil.com/>

non de biologio, kemio, statistiko ktp. Tamen, liaj lastaj libroj *Numbers Don't Lie* (Nombroj ne mensogas) el 2020 kaj la ĉi tie pritraktata *How the World Really Works* (Kiel la mondo reale funkcias) el 2022 celas ĝeneralan publikon.

Temas ne nur pri la riĉuloj

Inter la ĉefaj bezonoj de homo estas manĝaĵoj. La riĉa parto de la mondo povas konsiderinde malpliigi sian bezonon je energio kaj aliaj resursoj aplikante la konsilojn de klimataktivuloj, ekzemple manĝante malpli da viando, sed Smil atentigas pri la bezonoj de la alia parto de la mondo. Malgraŭ la kreskanta loĝantaro eblis malpliigi la nombron da homoj, kiuj malsatas, sed multaj restas malsataj. Eĉ plias tiuj, kiuj disponas pri la minimumo kaj deziras havi pli. Kontentigi tiujn postulos multe pli, ol la riĉuloj povus ŝpari rezignante pri viando kaj per aliaj raciigoj.

Kvar pilieroj

La ĉefa temo de la libro, apenaŭ menciata en diskutoj pri klimatsanĝiĝo, estas la kvar pilieroj, sur kiuj baziĝas nia nuna civilizacio: amoniako, plasto, ŝtalo kaj cemento. Ilia produktado konsumas ege grandajn kvantojn da energio, kaj ili estas nemalhaveblaj. Amoniako (NH₃) estas kombinaĵo de nitrogeno kaj hidrogeno, bazo de kemia sterko, nepre necesa en agrikultura sistemo, kiu nutru ok miliardojn da homoj. Plastoj estas ĉie kaj iĝis nemalhaveblaj en la nuna socio. La produktado postulas multe da energio el petrolo aŭ gaso (sed por iuj aplikoj malpli ol ŝtalo kaj cemento). Plastajoj je la fino de sia vivo

ofte alvenas en rubejoj aŭ en la maro anstataŭ esti reuzotaj. Produktadi ŝtalon kaj cementon estas same energivore. La nuna mondo estas neimagebla sen tiuj produktoj. Kiel pri manĝaĵoj, la riĉaj landoj kapablas esti multe pli ŝparemaj uzante tiajn materialojn, sed la ceteraj landoj, kiuj komencas uzi ilin, nenigos tiujn ŝparojn.

Viando, fiŝaĵoj kaj aŭtoj

Smil ne estas vegetarano, modere manĝas viandon kaj kontraŭas veganismon. Laŭ li nepre necesas, kie eblas, uzi por brutarbredado la partojn de la mondo, kiuj ne taŭgas por intensa agrikulturo. Fiŝado akcepteblas apud la marbordoj, kie ne tro altas la

”

Biciklo de 7 kg povas transporti unu personon; sporta util-veturilo de 2000 kg kutime transportas ankaŭ nur unu personon

brulajkonsumo de ŝipmotoroj.

Ofte plendobjekto de Smil estas la troa pezo de la nun plej popularaj aŭtomobiloj, la „sportaj util-veturiloj” (SUV). Ekzemplo el *Nombroj ne mensogas*: biciklo de 7 kg povas transporti unu personon; SUV de 2000 kg kutime transportas ankaŭ nur unu personon.

Pesimisto aŭ optimisto? Ne: sciencisto!

Dum iuj neas la problemojn, kaj aliaj prognozas katastrofojn, Smil atentigas pri forgesoj en la diskutoj. Efektive ekzistas problemoj, eĉ multe pliaj kaj alispecaj ol kutime menciata, necesas kaj eblas trovi solvojn, sed multaj el la proponataj estas nerealismaj aŭ sensecaj kaj ne rapide realigeblaj. ■



Roland ROTSAERT laboris en la financa sektoro. Li estas pensiulo ekde 2010 kaj nun i.a. volontulas en lokaj arĥivoj.

La KancerKliniko

Politika Kultura Skandalema Ajnista

4 numeroj jare + La Krom

lkk@free.fr

Regulaj kunlaborantoj: Serge Sire, Ionel Onet, Mikaelo Bronŝtejn, Laŭrenco Septier, Mao Zifu, Jopetro Danvy, Gennadij Turkov, Russ Williams, Stéphan Brault, Ŝarlerik d'Arroi, Ĵak Le Puil, Lilia Ledon, N. Xil Carvalho, Robert Molimard, Claude Gerlat, Trevor Steele, Ian Fantom ktp.

Abono: 27,50 € (ekde 16 en kelkaj landoj)
Jacques Le Puil, pĉk 12 729 73 X Paris
aŭ ĉe FEL, UEA, Esperanto-USA, ktp

RELIGIOJ

La bahaa kredo: vojo al unueco kaj paco

Bernhard WESTERHOFF
Germanio

La konstruaĵoj de la Bahaa Monda Centro, la t.n. Arko, en Hajfo, Israelo, ene de belegaj ĝardenoj.

„Kion la Eternulo ordonis kiel suverenan kuracilon kaj plej fortan rimedon por resanigi la tutan mondon, tio estas la unuiĝo de ĉiuj popoloj en unu universala Religio, unu komuna Kredo.”

„Li, Kiu estas via Sinjoro, la Plej Kompatema, vartas en Sia koro la deziron ekvidi la tutan homaron kiel unusolan animon kaj unusolan korpon.”

„Se la nuntempaj kleruloj kaj pensuloj permesus al la homaro enspiri la bonodoron de kamaradeco kaj amo, ĉiu komprenema koro estimus la signifon de vera libereco kaj malkovrus la sekretojn de neĝenata paco kaj absoluta trankvilo.”

Bahá'u'lláh

La granda paco, al kiu la homoj de bona volo dum jarcentoj plenkore sopiris, kiun viziuloj kaj poetoj el sennombraj generacioj prirevis kaj kiun la sanktaj skriboj de la homaro promesis de epoko al epoko, finfine estas je atingigo de la nacioj. ... La monda paco estas ne nur ebla, sed neevitebla. Ĝi estas la

venonta ŝtupo en la evoluo de tiu ĉi planedo ...” Jen la enkondukaj vortoj de la bahaa pacmesaĝo publikigita sub la titolo „La promeso de monda paco” sojle de la monda jaro de paco 1986. Antaŭ la fono de la nuna mondsituacio kun ĉiam pli da violentaj konfliktoj tiuj ĉi vortoj eble aspektas iom bizare kaj povus elvoki sarkasmon. Tamen, dum la

trionjarcento de tiam pasinta ankoraŭ pli evidentas la bezono de tutmonda paco, kaj daŭre kreskas la ĝenerala sopiro je ĝi. Indas do ree ekzameni la programon, kiun proponas bahaismo por fine atingi vere daŭripovan pacon kiel la sekvan ŝtupon en la evoluado de nia planedo kaj ĝiajn principojn kaj instruojn fone de tiu pacprogramo.

Promeso de monda paco

Tiu pacmesaĝo de la Universala Domo de Justeco direktita al la popoloj de la mondo profunde ekzamenas la demandojn kaj prezentas la paŝojn farendajn por starigi stabilan pacon. Pli ol iam nuntempe ĝi aktualas. Interalie ĝi klarigas, kiel religia kredo estas



Celebrado de la 200a datreveno de la naskiĝo de Bahá'u'lláh en Utrecht, Nederlando en oktobro 2017 kun muziko, preĝoj kaj filmprezento.

fundamenta antaŭkondiĉo por vera paco, ĉar kio distingas la homon disde ĉiuj aliaj vivospecoj estas talentoj, kiuj „ebligis al la homaro konstrui civilizojn kaj prosperi materie. Sed sole tiaj atingoj neniam kontentigis la homan spiriton, kies mistera naturo inklinigas ĝin al transcendo, strebado al nevidebla sfero, al la fina realeco, la nekonebla esenco de esencoj nomata Dio. La religioj, alportitaj al la homaro de sinsekvo de spiritaj lumiloj, formis la ĉefan ligo-

lon inter la homaro kaj tiu fina realeco, kaj ili stimulis kaj fajnigis la kapablon de la homaro akiri spiritan sukceson kune kun socia progreso.” Tiel la mesaĝo resumas la esencon de la bahaa teologio, nome la principon de progressa revelacio, kiu samtempe konfirmas la unuecon de la religioj.

Instruoj

Tra la historio Dio sendis al la homaro sinsekvon de diaj Edukantoj – manifestiĝoj de Dio. Iliaj instruoj



Kion bahaanoj principe subtenas, estas ne iu konkreta lingvo aŭ lingvo-projekto, sed precipe la ideo mem enkonduki internacian helpan lingvon

antaŭenigis la civilizon. En tiuj Manifestiĝoj inkluziviĝas: Abrahamo, Kriŝno, Zoroastro, Moseo, Budho, Jesuo kaj Mohamedo, kaj krome ankaŭ Báb (1819–1850) kaj Bahá'u'lláh (1817–1892), la ĝis nun lastaj el tiuj mesaĝistoj kaj la fondintoj de Bahaismo, kiuj klarigas, ke tiuj Mesaĝistoj reprezentas la saman Fonton, kaj ke iliaj misioj esence estas sinsekvaj ĉapitroj en la disvolviĝado de la unusola religio de Dio. Aliaj bahaaj instruoj koncernas tiel esencajn temojn kiel la unueco de la homaro kaj eliminado de antaŭjuĝoj, la nobleco de la homa naturo, la komplementeco de devoteco kaj servado, la egaleco inter virinoj kaj viroj, la harmonio inter religio kaj scienco, la neceso de just-

Abundaj informoj pri la bahaa kredo troveblas en la internacia retejo de la bahaa komunumo <https://www.bahai.org> (kun deko da diverslingvaj versioj).

En Esperanto funkcias la retejo de Bahaa Esperanto-Ligo (BEL) <https://bel.bahai.de> kun informoj pri la kredo kaj ĝiaj rilatoj al Esperanto kaj kun aliro al la tradukoj de bahaa literaturo kaj al la menciitaj filmoj.

eco en ĉiuj homaj aferoj, la graveco de edukado, la forigo de ekstrema malriĉeco kaj riĉeco respektive starigi ekonomian justecon kaj bonfarton por ĉiuj ktp.

Vizio pri unuigita homaro

En la skriboj de Báb kaj Bahá'u'lláh troveblas ampleksa vizio por estonteco de unuigita homaro kunvivanta en prospera tutmonda socio. Ili priskribas la novan ŝtupon, kiun devas nun atingi la homa civilizo. Por realigi tion necesas ankaŭ iam enkonduki komunan lingvon kaj skribon kaj ĝeneraligi ĝin per instruado en ĉiuj lernejoj tra la mondo. La principo de internacia lingvo estas unu plia elemento de la bahaaj instruoj por funde reformi la kunvivadon de la popoloj. Al ĝi la aŭtoritataj bahaaj tekstoj donas altan rangon. Bahaaj fontoj agnoskas la meritojn de Esperanto kaj vidas ĝin kiel eblan solvon de la lingva demando. Sed ili ankaŭ emfazas, ke ne eblas antaŭscii, kiu estos la lingvo elektota. Kion do bahaanoj principe subtenas, estas ne iu

konkreta lingvo aŭ lingvo-projekto, sed precipe la ideo mem enkonduki internacian helpan lingvon.


Jen la fono de longdaŭraj amikaj rilatoj inter la bahaanoj kaj la esperantistoj. Tiujn rilatojn aparte profundigis kaj firmigis 'Abdu'l-Bahá (1844–1921), la plej aĝa filo de Bahá'u'lláh kaj la tria el la centraj personecoj de la bahaa kredo, kiu, kiam post ĉirkaŭ 60-jara mallibereco li povis fine libere moviĝi, en la jaroj antaŭ la unua mondmilito vojaĝis tra Eŭropo kaj Nord-Ameriko kaj i.a. plurfoje parolis al kunvenoj de esperantistoj. La enkorpiĝo de tiuj rilatoj iom pli poste fariĝis Lidia, la plej juna Zamenhof-ido, kiu meze de la 1920aj jaroj aliĝis al la bahaa kredo kaj ĝis sia tragika pereco en la nazia ekstermejo Treblinka multe propagandis la kredon kaj tradukis plurajn gravajn ĝiajn verkojn.

La bahaa komunumo

La bahaa komunumo, kiu ekde la originoj meze de la 19a jarcento en Persio rapide kreskadis kaj etendiĝis unue tra la mez-

orientaj landoj kaj poste tra la tuta mondo, intertempe reprezentigas en ĉiuj landoj kaj teritorioj de la mondo, ĉe Unuiĝintaj Nacioj kaj en multaj aliaj gravaj forumoj. Tiu komunumo, unuigita per unika, kohera, bazdemokrata sistemo, strebas meti la fundamentojn de tiu tutmonda socio, kiun ĝiaj ampleksaj skribaĵoj vizias, kaj prezentas sin kiel funkciantan modelon pruvantan, ke ja la homaro en tuta sia diverseco kapablas pace kaj harmonie kunvivi. La historio kaj evoluado de la Kredo same kiel ĝiaj strebadoj kaj agadoj por starigi veran pacon kaj modelajn komunumojn, kiuj invitas ĉiujn kunlabori pri la transformado de la mondo, estas facile alireblaj.

Abundas bahaaj eldonaĵoj kaj retpaĝoj. Aparte informriĉaj estas kvar filmoj, kiuj aperis okaze de la 200aj datrevenoj de la naskiĝo de Bahá'u'lláh (2017) kaj Báb (2019) kaj la 100a datreveno de la forpaso de 'Abdu'l-Bahá (2021). Komence de 2022 aperis krome filmo pri la disvolviĝado de la bahaa komunumo dum la lastaj cent jaroj, kiu iasence komplementas la detalan historion de la unuaj cent jaroj (1844–1944) de la kredo, *God passes by* (Dio preterpasas), kiun verkis Shoghi Effendi, la pranepo de Bahá'u'lláh, kaj kiu aperos en esperanta traduko en 2023 okaze de la 50a datreveno de la fondiĝo de Baha Esperanto-Ligo (BEL). ■



Bahá'u'lláh

Interesiĝantoj pri Bahá'u'lláh povas profite legi la jenan libron:
<https://www.retbutiko.be/eo/ero/baha>.



Spektu la filmetojn
 pri MONATO en
www.monato.be/jutubo

ESEO

Kio estas oblomovismo?

Nikita PIMENOV
Rusio



La termino „oblomovismo” (ruse: *обломовщина* [oblomovŝĉina]), derivita de la familia nomo de la heroo de la romano *Oblomov* (ruse: *Обломов*) de Ivan A. Gonĉarov, estas uzata en la rusa por priskribi miksajon de apatio, letargio kaj inerteco. Nikita Pimenov priskribas la romanon, kiu popularigis tiun vorton.

En la komenco de la romano, post priskribado de Ilja Oblomov, Ivan A. Gonĉarov akompanas nin al liaj ĉambroj kaj priskribas ilian dekoron laŭ la sama maniero kiel, ekzemple, Nikolaj Gogol en sia proza poemo *Malvivaj Animoj*.

La internaĵo, la dekorado de la ĉambroj de la herooj tre bone montras ilian internan mondon. En la ĉambro de Oblomov estas faldeblaj ŝirmiloj kun mirindaj kaj eksterordinaraj birdoj, malfirmaj bretoj, kurtenoj remburitaj per multekosta kaj luksa materialo, malgraciaj seĝoj kaj sofo, kies dorso kaj kruroj defalis. Kaj ekzistas multe da polvo kaj speguloj, kiuj jam ne reflektas ion ajn, sed povas funkcii kiel tabuloj por skribado de ĉiaj gravaj notoj. Kaj nur telero kun kokina osto kaj pana krusto kaj la posedanto mem, kuŝanta sur la sofo en la ĉambro, diras, ke iu loĝas en ĉi tiuj ĉambroj.

Polvo kaj speguloj

La asocioj, kiuj estiĝas ĉe la leganto, kvazaŭ estas intence provokitaj de la aŭtoro. La malfirmaj bretoj kaj rompita sofo rememorigas

nin pri Manilov, la senaga revemulo el *Malvivaj animoj* kun liaj nepretigitaj mebloj kaj brakseĝo, nur duone remburita per luksa ŝtofo. Malelegantaj seĝoj memorigas pri Sobakeviĉ, alia heroo el la sama verko, pri lia meblaro kaj pri tio, kiel ĉiu seĝo en lia domo kvazaŭ krias: „Ankaŭ mi estas Sobakeviĉ”. La polvo ĉie kaj la speguloj, similaj al tabuloj, sur kiuj oni povas skribi, memorigas nin pri alia figuro, Pljuŝkin.

Samtempe la aŭtoro parolas pri la nekredeble malvarma okulrigardo de Oblomov kaj pri la eĉ pli malvarma okulrigardo de lia servisto Zaĥar, per kiuj ili ambaŭ ĉirkaŭrigardas la dekoron de la ĉambro. Kaj la okulrigardo de Oblomov kvazaŭ diras: „Kaj kiu ĉion alportis ĉi tien, altrenis kaj starigis?” Kaj subite montriĝas, ke ĉi tiu dekorado, la malfirmaj bretaroj kaj la

malelegantaj seĝoj, ĉio, kion la posedanto trenis en la ĉambron, neniel rilatas al li.

Sofo, noktosurtuto kaj orientaj ŝuoj

La domo, en kiu Oblomov vivas kaj en kiu li vidas mirindan sonĝon pri perdita paradizo, estas nur pseŭdodomo. Kiel komenciĝas la romano *Oblomov*? En Sankt-Peterburgo, en la strato Goroĥovaja, en grandega domo, kies loĝantaro estus sufiĉa por tuta provinca urbo, sur sofo kuŝas Ilja Iljiĉ Oblomov. Ĉi domo ne estas domo, en kiu iu vivas. La ĉefa refreno, kiu sonas, kiam diversaj homoj venas al Oblomov, estas lia demando „Ĉu estas iu ĉi tie?” En sia domo Oblomov havas nur sofona noktosurtuton kaj tiujn orientajn ŝuojn, en kiujn estas tiel komferte enmeti la piedojn, malsupriginte ilin de la sofo.

Nenifarado

Sed estas maleble ne rimarki la ravan intonacion de la enkonduko. En iu carlando, en iu regno, vivis ... vivis kaj kuŝis sur sofo homo, nomata Ilja, ĉirkaŭ tridek-du-aŭ-tri-jaraĝa. Kompreneble, oni asocias lin kun Ilja Muromec, unu el ĉefaj herooj de la antikva rusa epika eposo. Dum tridek tri jaroj la fortegulo el la urbo Murom el la vilaĝo Karaĉarovo okupiĝis pri nenifarado, kaj kiam vagantaj kripluloj venis al li kaj diris: „Leviĝu, Eliĉjo!”, la fortegulo respondis, ke li ne povas leviĝi, ĉar liaj gamboj ne plu funkcias. Sed la vagantaj kripluloj donis al li eliksiran mieltrinkaĵon. Ilja trinkis ĝin kaj, ekhavinte eksterordinaran forton, ekstaris kaj iris batali kontraŭ malamikoj de Rusio.

En la unua parto de la romano diversaj homoj venas al Oblomov, kiu kuŝas kaj dormas. Ni vidas portreton de la dormanta Oblomov. Kaj en ĉi tiu portreto la plej grava estas la penso, kiu flugetas trans lian vizaĝon kiel libera birdo, kaj tiu esprimo de bonkoreco, kiun nenio povas nuligi. La bonkoreco de la animo, kiun nenio povas detrui, reflektiĝas en la trajtoj de lia vizaĝo kaj en la faldoj de lia ŝatata noktosurtuto.

Homoj kun parolantaj familiaj nomoj venas al Ilja. Iu nomata Volkov („tiu de lupo”) estas tre surprizita, ke Ilja Iljiĉ daŭre restas en

lito, kiam li, Volkov, jam sukcesis fari tiom da aferoj: aĉeti kelkajn specialajn gantojn kun laĉoj kaj frakon, kiu ĵus fariĝis moda, kaj, kompreneble, ricevi biletojn por la festo de la unua de majo, kiu okazos morgaŭ en Jekaterinhof. „Kial do vi ankoraŭ ne ellitiĝis? Kial do vi ne havas biletojn? Kial do vi ne havas ĉevalon?” Sur kiun ĉevalon sidiĝos Ilja Iljiĉ Oblomov? Li diris: „Mi ne rajdos”. Volkov proponas al li sidiĝi en kaleŝon kun siaj amikoj sur lignan benkon, sed Ilja Iljiĉ ne volas sidiĝi sur lignan benkon. Kiam Volkov rakontas al li, kiel mirinda estas la vivo en societo, li rakontas al Oblomov ankaŭ, ke ĉe Mezdrov („tiu de reverso de felo”) oni parolas nur pri muziko kaj ke ĝis cent homoj venas tien, kaj ĉe Mussinskij oni parolas tuttempe nur pri arto, kaj ĉeestas ankaŭ multaj homoj. Ilja Iljiĉ havas nenion ideon, kio povus esti interesa en konversacio, en kiu partoprenas cent homoj. Kiam Volkov adiaŭas, Oblomov diras: „Dek lokojn en unu tago! Kia malŝparo!” – kaj restas, kompreneble, sur sia sofo.

Poste Sudjbinskij („tiu de sorto”) venas al Oblomov. Ilja Iljiĉ Oblomov alvenis al Sankt-Peterburgo antaŭ dek du jaroj kiel dudek-jaraĝa knabo kaj komencis servi en departemento, sed poste forlasis ĝin. Kaj Sudjbinskij daŭrigis lian servon. Kaj li faris tian mirindan karieron, ke nun

li ne nur ne plu venas al la departemento antaŭ la naŭa aŭ eĉ la oka horo, sed estas ankaŭ invitata al la departementestro por teo. Jen kion tiu homo ricevis. Kaj estas tiom da novaĵoj en la departemento. Kiam Sudjbinskij foriras, kompreneble, sen tentado de Ilja Iljiĉ por leviĝi de la sofo, Oblomov pensas: „Pereis kara amiko. Kaj blinda, surda kaj muta por la resto de la mondo li estas. Kaj kiom malmulte al persono estas bezonate ĉi tie: lia menso kaj sento de volo”.

Ekstaro

Kaj kiam la literaturisto Penkin venas kaj rakontas al Oblomov pri progresemaj romanoj kaj artikoloj, kie unu tre sprite sukcesis piki la alian, kaj la alia, siavice, donis frapan baton responde, Oblomov ne vidas ion ajn interesan por si mem: „Vi volas skribi nur per la kapo. Vi pensas, ke la menso ne bezonas koron. Ne! Ne! Pensoj estas fekundigitaj per homa amo.” Neniu el la vizitantoj sukcesas doni al Oblomov la mieltrinkaĵon. Tamen je la fino de la unua parto Oblomov ekstaras. Andrej Ŝtolc, intima amiko de Oblomov, sukcesas levi lin.

Humura

La romano estas tre humura, kaj la plej mirindaj epizodoj en ĝi estas la konversacioj de Oblomov kun lia servisto Zahar. La konversacioj esence estas tre malĝojaj, sed nekred-

eble amuzaj kaj humuraj, ĉar Zahar estas laŭkaraktere eĉ pli „Oblomov” ol Ilja Oblomov mem. Estas kurioze, ke, pensante pri oblomovismo, la literatura kritikisto kaj publicisto N. Dobroljubov diras, ke ĉio tio okazis al Oblomov, ĉar li havis tricent servutajn Zaharojn. Sed Zahar, estante eĉ pli „Oblomov” ol Oblomov mem, ne havis tricent Zaharojn. Zahar estas parodia similulo de Oblomov. Kaj tiu filozofio de rezigno de vanteco, de strebo al paco kaj harmonio estas tre bone esprimita per Zahar, kiun Oblomov akuzas pri tio, ke la planko en la ĉambro estas malpura kaj ne estis balaita dumlonge. Sed Zahar diras, ke li balais la plankon en ĉi tiu ĉambro antaŭ tri tagoj. Zahar havas ĉion distribuita kaj mezurita. Se necesas forviŝi la polvon, tiam tio estos farita, ekzemple, antaŭ Kristnasko. Kaj se necesas viŝi la pentraĵojn aŭ lavi la fenestrojn, tiam tio estos farita, ekzemple, antaŭ Pasko. Kaj Zahar ne intencas ŝanĝi la establitan ordon de aĵoj, kiu regas jaron post jaro.

En la romano *Oblomov*, kiel ofte okazas en la rusa literaturo, ekzistas provo de amikeco, kiun Oblomov eltenas kun honoro. Nia fido je tiu amikeco komenciĝas, kiam Oblomov leviĝas kaj iras kun sia amiko laŭ la plano, kiun Ŝtolc proponas al li. Poste Oblomov kaj lia amiko iras al ĉiuj lokoj, kien la grava persono Ŝtolc opinias necese venigi Oblomovon. ■

FRANCIO

Roger Martin du Gard, literaturisto kaj pacisto



Renée **TRIOLE**
Francio

La franca verkisto Roger Martin du Gard (1881-1958) estas preskaŭ forgesita, kvankam li ricevis la Nobel-premion pri literaturo en 1937. Jam en la mezgrada lernejo li decidis iĝi verkisto, pro tio li studas (sen granda sukceso) beletron kaj poste devojiĝas al studado de arkivoj. En 1913 li eldonas sian unuan romanon *Jean Barois*, pri tiutempa religio, kaj sekve amikiĝas kun André Gide. En 1914 li iĝas soldato, kio faros el li pacdefendanton. Lia pacismo manifestiĝas en liaj leteroj kaj en la 8-parta romano *Les Thibault*, sagao pri familio, plena je infanaĝaj memoraĵoj, portreto de socia klaso, alvoko al fratiĝo inter francaj kaj germanaj soldatoj. Verŝajne inda je relego en nia malpaca mondo.

En 1906 Martin du Gard edziĝas kun filino de

advokato Albert Foucault, kiu posedas grandan bienon kun kastelo en Normandio (Francio). Li skribas pri tiu loko la jenon la 10an de aŭgusto 1937 en sia taglibro: „En tiu bela spaco mia penso senĝeniĝas, bele ordiĝas en tiu kadro kun ĝustaj proporcioj, floras en tiu iel sovaĝa silento, libere disvolviĝas en tiu intima loko, inda je meditado, sed samtempe plena je grandeco.”

Arkivoj

Li konsciis, ke liaj arkivoj estas interesaj. Li skribis taglibron inter 1919 kaj 1949 kaj lasis rigorajn instrukciojn, por ke oni zorge konservu kaj informu pri ili. Lia biblioteko ne ŝanĝiĝis: samas la foteloj, sed ĉefe li katalogis 11 000 presajojn, librojn kaj gazetojn. Proksimume 2000 libroj estas dediĉitaj de konataj aŭ malpli

konataj verkistoj. Post lia morto la filino invitas poetojn kaj artistojn krei en la kastelo de Tertre. Kun helpo de fondaĵo la nepino kaj pranepoj puŝas al klasifiko de tiu bieno inter „historiaj monumentoj”, dum la 9-hektara parko eniras la liston de „rimarkindaj ĝardenoj”. Templo de filozofio donas al la ĝardeno esceptan karakteron, ligante ĝin al la kosmopolita eŭropa penso de la kleristoj (movado de la 18a jarcento).

Tiu rezidejo estas senpaga alirebla dum somero, sed ĉefe ĝi funkcias kiel kunvenejo por artistoj, atelieroj, por ke muzikistoj, aktoroj kaj verkistoj trankvile laboru kaj kreu. Ŝajne lia ĉefverko ne estis tradukita en Esperanton (tro longa), sed liaj korespondataĵoj kaj taglibroj estas interesaj por leganto de la 21a jarcento, ĉar filozofie aktualaj. ■



La libroj kaj diskoj recenzitaj en MONATO estas mendeblaj de la Retbutiko de FEL

Lange Beeldekensstraat 169,
B-2060 Antwerpen,
Belgio.
tlf. + 32 3 234 34 00
rete: retbutiko@retbutiko.be
skajpe fel-monato
www.retbutiko.be

Post Babelo estu lingvo monda, sed kulture eŭropa

Renato CORSETTI

Tion la kristana Dio, sendube la plej potenca, estus povinta diri en la biblia ĉapitro pri la babela turo, sed mi ne trovis tiun aserton, kiun esperantistoj pretervole praktikas de jarcento. Tie, en ĉapitro 11a de Genezo, oni priskribas nur la bonan originalan staton, al kiu Esperanto provas revenigi la homojn: 1. Sur la tuta tero estis unu lingvo kaj unu parolmaniero.

Tragoloj kaj durioj

Verkoj, kiel tiuj de Yohanes Manhиту provas korekti la malekvilibron. La afero ne estas facila por eŭropano kiel mi, kiu abrupte trovas sin trempita en la indonezia socio kun strangaj bestoj kaj strangaj arboj. Ekzemple „Elefanto batalas kontraŭ elefanto, mortas tragolo en la mezo”. La ĝenerala senco estas klara „Kiam potenculoj batalas, ne enmiksiĝu”, sed kio estas tragolo? Temas pri kuniklo-granda hufulo, pri kiu, se vi estas lerta ĉasisto, vi povas trovi eĉ en Vikipedio paĝon. Tamen

por trovi ĝin, vi devas serĉi la nomon en la latinscienca: *Tragulus*. Ne estas alia vojo. Tragoloj bone kaŝas sin.¹

Por festi vian trovon vi povas citi alian indonezian proverbon „Mi trovis falintan durion”, alivorte „Mi havis grandan bonŝancon”, ĉar durio, pli facile trovebla en Vikipedio, estas manĝebla ovoforma fruktego, kies ĉirkaŭo povas atingi ĝis 40 centimetrojn. Vi eble ne konas ĝin, sed en sud-orienta Azio ĝi estas konsiderata la reĝo de la fruktoj.

Kaj tiel vagante de unu proverbo al la alia, kaj en la libro estas 1000 indoneziaj proverboj, vi konatiĝas kun la lando, la vivo, la domoj, la festoj kaj la kredoj de ĉi tiu 200-miliona parolantaro de la indonezia interdenaskaj parolantoj kaj dualingvaj parolantoj. Kelkaj proverboj estas facile kompareblaj kun eŭropaj proverboj,

1. PIV difinas tragolon jene: genro (*Tragulus*) de tre malgrandaj parhufuloj, vivantaj en suda kaj sudorienta Azio, ne tre parencaj al la ceteraj parhufuloj. (red.)

ekzemple „Estas akvo, estas fiŝoj” pensigas pri la zamenhofa „Kie fumo leviĝas, tie fajro troviĝas” kaj „Nigra koko flugas nokte” kongruas kun la diro en kelkaj eŭropaj lingvoj „Nokte ĉiuj katoj estas nigraj”, sed por kompreni aliajn oni devas atente legi aldone al la laŭvorta traduko klarigojn de la aŭtoro, ekzemple „Se estas rizo, metu ĝin en rizon”, kies signifo estas „Se vi havas sekreton bone kaŝu ĝin” (metante ĝin tien, kie oni ne rimarkos ĝin) aŭ „Kokido ligita estis kaptita de aglo”, kion oni uzas por komenti la forfuĝon de edzino kun nova partnero.

Ankaŭ latinaj

Bonŝance por ĉiuj 1000 proverboj la verkinto donis la tradukon kaj la signifon.

Sed li faris ion kroman, kio estos utila por multaj eŭropanoj. Li aldonis liston de latinaj eldiroj kaj terminoj kun indoneziaj kaj esperantaj tradukoj. Finfine estos eble diri en Esperanto *urbi et orbi* aŭ *a fortiori* en maniero komprenebla al ĉiuj. La dua aldonajo kun du-paĝa proverbaro trilingva (indonezia-davana-esperanta) estas ĉefe utila al lingvistoj, kiuj volas esplori lingvojn de malplimulto en Indonezio. La davana estas lingvo parolata en Orienta Timoro kaj kara al la aŭtoro, kiu aperigis multajn poemojn en ĝi.

Estas oportune diri kelkajn vortojn ankaŭ pri la aŭtoro, kiu estas profunda esperantisto trempita en amaso da lingvoj. Pensu nur, ke lia elementa lernejo uzis la tetuman kaj la por-



Yohanes Manhиту:
Indonezia-Ĝenerala Proverbaro.
Eldonejo Libera, Antverpeno, 2022.
97 paĝoj.

tugalan (eble la nomo Timoro vekas ion en via memoro), la gimnazio la indonezian, kaj en la universitato la aŭtoro studis anglan literaturon. Nun li laboras kiel lingvoinstruisto kaj tradukisto.

Ekstreme favora

Mia juĝo pri la libro estas ekstreme favora, kaj mi esperas, ke similaj verkoj aperos ankaŭ pri proverboj de aliaj aziaj kaj afrikaj lingvoj, ĉar sub la malsamaj kulturaj kovriloj (indonezianoj parolas pri rizo kaj la eŭropa proverbaro de Zamenhof pri pano) oni malkovras, ke homoj estas ĉiuj kaj ĉie egalaj kun samaj zorgoj, samaj amoj kaj malamoj, samaj bonoj kaj malbonoj, kaj do tiuj, kiuj provas kredi al ni, ke ekzistas popoloj elektitaj, gvidaj popoloj kaj gvidataj – ankoraŭ evoluontaj popoloj, simple mensogas por sia profito. Homoj estas samaj, kaj mi mem ne povas trovi kernajn malsamecojn inter indonezia aŭ itala kamparano kaj eŭropaj elituloj. Kaj, kiam temas pri gravaj homaj valoroj – helpemo al aliaj homoj, ĝentila kunvivado, prizorgo de malfortuloj – nekleraj kamparanoj ofte superas la superkle-rajn gvidantojn. ■

Ĉu unika priskribo de lesba rilato?

Bert DE WIT

La libro *Secesio* estas originala romano en Esperanto. Ĝin verkis la konata sveda Esperanto-aŭtoro Sten Johansson. PIV mencias, ke secesio estas „apartiĝo disde socia korpo, al kiu oni apartenis, ekz. eklezio, federacio, ŝtatunuigo, por iĝi sendependa”. La nomo *Sezession* en la germana estas konata i.a. kiel indiko por konstruaĵo en Vieno, kiu tute klare montras la stilon de Novarto/Junularstilo (*Jugendstil*). Per tiu vorto *Sezession* oni indikis ankaŭ artismajn movadojn, kiuj volis apartiĝi de la ĝis tiam kutimaj artaj skoloj. Konataj nomoj en tiu kadro estas Gustav Klimt, Franz Stuck kaj Edvard Munch. En Berlino Max Liebermann fondis en la sama tempo la berlinan „secesion”.

Tial ne estas hazarde, ke sur la frontkovrilo de la libro estas bildoj el Vieno, artaĵoj de Klimt kaj *Karl Marx-Hof*, la loĝejkvartalo por laboristoj, kiu konstruiĝis en la fino de la dudekaj kaj komenco de la tridekaj jaroj.

Sed la malsupra bildo jam montras ion alian ol artaĵo, nome soldatojn.

La ĉeftemo de la libro estas la amo inter du virinoj: dana virino, kiu nomiĝas Willi Singer, kaj aŭstra virino, Louise Gerber. Ili renkontiĝas dum ekspozicio de nova arto en la Secesio en Vieno. Willi estas ĵurnalisto, Louise skulptisto. El tiu hazarda renkontiĝo ekflamas amrilato. Ĉar ili vivas en la fino de la dudekaj jaroj en Aŭstrio, tia rilato inter du virinoj ne estas publike aprezata. Amiko, Johnny Weininger, moda danto kaj bankoficisto, regule organizas festojn por nekonvencijaj homoj, kun alkoholo, sed ankaŭ kun drogoj. Kun li la paro ofte aŭte ekskursas. Johnny havas amikojn diversspecajn, kiuj kelktempe loĝas ĉe li.

La polico en tiu tempo jam komencis esplori tiujn rilatojn, ĉar samseksemo estas malpermesata.

Kresko de ekstremismo

La du virinoj serĉas iun loĝejon, kie ili povos facile restadi sen problemoj. La skulptejo de Louise ne taŭgas, kaj Willi tro ofte for-estas de Vieno, raportante al dana ĵurnalo aŭ verkante libron. Johnny proponas al ili ĉambrojn, kiujn ili luas. Louise por la ekstera mondo estas sinjorino Weininger, eĉ por siaj gepatroj. Kaj la du virinoj kompreneble partoprenas festojn en la domo.

En la fino de la dudekaj jaroj la vivstiloj de Johnny kaj la virinoj ankoraŭ estas tolerataj, sed oni rimarkas jam la kreskon de politika



Sten Johansson: *Secesio*.
Eld. Mondial, Nov-Jorko, 2021.
320 paĝoj, kudre bindita.
ISBN 978-159569425-6. 254 paĝoj.

Prezo ĉe FEL: 24,79 eŭroj plus afranko.

ekstremismo. Feliĉe, en Vieno la socialdemokratoj dum longa tempo rezistis al tiu tendenco. Tiel Louise esperas, ke ŝi ankoraŭ povos fari skulptaĵojn por la nova loĝejkvartalo *Karl Marx-Hof* laŭ mendo de la urbestro. Ŝiaj statuoj por apuda kinejo estas admirata ekzemplo kaj imitindaj. Pri tio ŝi havas kontakton kun Franz Halder, kiu laboras ĉe la urbodomo pri konstruprojektoj por laboristoj. Ili ofte renkontiĝas, kaj Franz enamiĝas al ŝi. Sed Louise jam fordonis sian koron al Willi.

Poste Willi eklaboras en la provinco en gastejoj por povi raporti laŭ propra sperto pri la situacio en la kamparaj regionoj. Louise nur malmultajn informojn ricevas pri ŝiaj travivaĵoj. Tio ĝenas ŝin, sed venas ĉiam la momento de revido.

Sociaj problemoj

En la tridekaj jaroj pliakraiĝas la sociaj problemoj pro la ekonomia krizo, kaj ankaŭ kreskas la persekutado al tiuj, kiuj ne adaptiĝas al la idealtipa rolo. Johnny en iu momento estas forportata de la polico al nekonata loko, estante tro konata gejo. Supozeble oni malliberigis lin en iun psikiatrejon.

Louise konsciiĝas, ke ŝi, jam grandaĝa, havas ankoraŭ deziron patriniĝi. Ŝi priparolas la aferon kun Franz, kiu unue kredas, ke ŝi volas reanimi la amrilaton kun li.

Tamen ŝi volas nur havi infanon de li. Ŝi dufoje gravediĝas, ĉar pro streĉo kaj aliaj kaŭzoj ŝi perdas la unuan feton.

La situacio en Vieno iom post iom plimalboniĝas: la ekstremdekstro neniigas la iaman laboristan superregon en Vieno, kaj aŭdiĝas laŭdoj pri la nazioj en apuda Germanio. La juda patro de Louise jam delonge ne plu povas gvidi orkestron kaj fine eĉ ne plu rajtas ludi en violonensemblo por vivteni sin. Diversaj homoj preparas sin por fuĝo el lando, kiu pli kaj pli persekutas homojn, kiuj ne konvenas, ĉu gente, ĉu sekse, ĉu politike, al la reĝimo, kiu instaliĝas. Willi devas foriri el Aŭstrio, estante nedezirata persono. Louise restas. Per tio finiĝas la libro. Oni ne scias, ĉu ŝi poste eskapis la teroron aŭ ne.

Unika priskribo

La libro de Johansson estas eble unika en sia priskribo de lesba rilato. En la libro la aŭtoro verve traktas la problemojn, kiujn alfrontis homoj en la dudekaj kaj tridekaj jaroj en Aŭstrio. Mi ne scias, ĉu viro kiel Sten Johansson estas plej taŭga por priskribi lesban rilaton, sed ĉiuokaze la dialogoj en la libro estas tute kredeblaj kaj neniel fremdigas. La fono de la viena historio donas specialan karakteron al la libro. Kaj la titolo *Secesio* estas bone elektita laŭ diversaj vidpunktoj. ■

Infanlibro pri diverseco

Kirilo **Brosch**

La grandformata infanlibro *Ni ĉiuj estas malsamaj* aliĝas al la kreskanta grupo de enhave kaj forme altkvalitaj libroj, per kiuj EAB de ioma tempo furoras en la esperanta libromarkato. Tehnike ĝi estas perfekte eldonita libro, neniel malsupera al la angla lingva originalo, kiu aperis nur unu jaron pli frue (kaj, parenteze kaj apenaŭ kredeble, kostas pli ol la tradukaĵo). La tempo de enhave malaktualaj, lingve dubindaj kaj maldiligente eldonitaj libroj, precipe infanlibroj, pri kio mi plendis en prelego ankoraŭ en 2021, estas definitive pasinta, bonŝance.

La libro konsistas el dudek ĉapitroj el po unu duobla paĝo kun desegnoj kaj akompanantaj tekstoj (plej ofte kiel parolaj/pensaj vezikoj), dupaĝa glosaro por kelkaj terminoj

(mi tamen ne scias, laŭ kiu kriterio nocio tie aperas) kaj dupaĝa indekso de la plej gravaj temoj. Ĝia temo estas, kiel jam klaras per la titolo, la homa diverseco kaj ties festindeco. Per la ekzemplo de lernejo plena je diversaj infanoj estas prezentataj la plej gravaj ecoj, laŭ kiuj homoj malsamas, kiel sekso, etno, kulturo, korpa aŭ mensa handikapecoj, familia modelo (aŭ orfeco), kapabloj kaj intereso. Oni lernas, ke ĉiu homo estas unika kaj same valora, sendepende de siaj ecoj. Ĉi ĉio estas farata plejparte per favoraj ekzemploj, ne per lamentado pri nejustaĵoj (kies ekzisto tamen ne estas prisilentata). La libro finiĝas per la simpla kaj grava mesaĝo, „Ni ĉiuj estas homoj” – efektive simila al nia tradicia „sed homoj kun homoj”. Ne estas aparta ĉapitro pri lingvaj diverseco kaj diskriminacio, sed lingvoj estas menciataj en la paĝoj pri fremdaj landoj kaj internacia migrado. El esperantisma vidpunkto oni

kompreneble atendus pli larĝan trakton de tiu temo ol la tiea sugesto, ke lingva diverseco estas nur demando de infanaĝa lernado de nova media lingvo.

Klara senpeka lingvaĵo

Nek la libro nek la priskribo en la retbutiko de EAB enhavas informojn, por kiu aĝo ĝi taŭgas. Mi taksas, ke estas plej frukto-done legi ĝin al/kun infanoj en la aĝo de 4 ĝis 8 jaroj. Pli junaj ne komprenus multe, kaj por pli aĝaj la desegnoj kaj lingva stilo de rekta, simpla alparolo kaj konstataado ne plu estas allogaj. Krome, almenaŭ en moderna liberala medio, dekjarulo verŝajne jam konscias pri la plimulto de la enhavo. Tian impreson mi ekhavis, legante la plejparton de la libro al miaj propraj infanoj (8-/11-jaraj), al kiuj ĝenerale tre plaĉis la libro.

La tradukinto (kaj la supozeblaj redaktintoj) brile plenumis la esperantigon de la teksto. Ĉio, eĉ iuj malgrandaj surskriboj en la fono, estas tradukita per klara senpeka lingvaĵo. Zorge legante, mi ne sukcesis trovi eĉ unu mistajpon, kaj la lokoj, kie mi stumblis lingve („fizikaj [= korpaj] handikapoj”, „rigardi iun en la okulojn”) ĉe kontrolo montriĝis nekritikindaj (kritikinda estis do maksimume mia nescio de tiuj uzoj; krom tio mi ne konis *Makatono*, sed ĝuste tiu esprimo estas klarigita en

la glosaro). Legantojn obseditajn pri pronomoj eble aldone interesas, ke en la ununura loko, kie estas pronoma rilato al persono de nekonata sekso, la libro uzas *ri*.

Angla rigardo al la mondo

Ĉi lasta observo donas al mi instigon eseeti pri du interrilataj aspektoj de la traduko: unu, kiun ĝi traktas, kaj unu, kiun ĝi ne traktas, kio tamen ne estas kulpo de la tradukinto, sed dependas de la originalo. La libro, ankaŭ ĝia esperanta versio vole-nevole, transportas anglan rigardon al la mondo. Tio enhave jam estis videbla en la neglekteto de lingvaj problemoj, sed antaŭ ĉio mi celas du lingvajn aspektojn.

Unue, en la ĉapitro „Knaboj kaj knabinoj” estas traktata (soci)seksa identeco (la libro uzas ĉi tie *genera*, kion mi ne povas formale kondamni, sed tamen forte kontraŭas), kaj la libro tiel tuŝas la problemon de perlingva diskriminacio seksa. Sed ĝi entute ne diskutas la problemon de radikoj, kiuj indikas iĉon (= virseksulon; kiel *patro*, *knabo*) kaj ĉe kiuj oni ĉiam devas indiki la sekson, aŭ la (malfortiĝantan) kutimon ĉiam aldoni *-in-*, kiam oni parolas pri ino („Ĝi estas instruistino”). Tiu pretersilento estas komprenebla, ĉar la angla disponas pri neŭtralaj radikoj kiel *parent* kaj simple tre ofte

entute ne esprimas la sekson ekster la personaj pronomoj. Kaj oni ja ne povas simple alinventi tekston pri la specifajoj de Esperanto, kvankam tiuj estas vigle diskutataj en la lingvokomunumo.

Preferataj pronomoj

Male, kaj jen la dua aspekto, la fakto, ke la anglaj personaj pronomoj estas seksindikaj, sekvigas eĉ plurajn alineojn pri tiu temo. Laŭ tio, ekzemple, uzi *ĝi* por neduumuloj (tio estas homoj, kiuj estas nek inoj nek iĉoj) aŭ nekonatoj estas ofende, kaj ĝenerale oni demandu kaj uzu ies preferatan pronomon. Tiu usondevena lingvokulturaĵo enhavas du miskomprenojn: Unue, *ĝi* ne estas la sama kiel la angla *it* kaj ne nomas nur aĵojn. Mi persone ja por neduumuloj tamen uzas *ri*, por egaligi ilin per propra pronomo al inoj kaj iĉoj, sed *ĝi* por nekonataj aŭ nespecifitaj homoj estas ne nur zamenhofa kaj logika, sed ĉiuokaze ne povas iun ofendi, ĉar ĝi ne nomas spe-

cifan individuon. Due, ĉiu homo ja havas rajton de respekta traktado, al kio nepre apartenas ankaŭ la respekto de ĝia seksa identeco. El tio tamen ne sekvas la rajto dikti iun specifan pronomon, kiun la kunparolanto eble entute ne uzas. Ĉar ekzemple mi identiĝas kiel iĉo, tiam min oni priparolu per la pronomo taŭga por iĉoj: plejparte tio estas *li*, sed kompreneble radikala riisto uzu *ri*, kaj radikala ĝiisto *ĝi*, kaj se ekzistas hiisto, ĝi uzu *hi*. Mi rajtas atendi, ke oni ne uzu por mi ekzemple la inan pronomon, sed mi ne rajtas dikti al iu ajn eble fremdan lingvan subsistemon. Efektive tio ja estas la celo de la koncepto de preferata persona pronomo; nur kelkaj homoj ŝajne misidentigas efikon kaj kaŭzon.

La fakto, ke tia preskaŭ lingvofilozofia fajnaĵo estas la ununura afero, pro kiu mi kritikis la libron, montras ĝian ĝeneralan bonecon, kaj ke ĝi malgraŭ infana celgrupo povas pensinstigi ankaŭ adoltojn. Mi ripete do tre rekomendas ĝin. ■



Tracey Turner; Åsa Gilland:
Ni ĉiuj estas malsamaj.
Tr. Jorge Rafael Nogueras.
Eld. EAB, 2022. 48 paĝoj.
ISBN 978-0-902756-50-2

Tolerema Esperanto-movado

Renato **CORSETTI**

Principe mi ne recenzas literaturajn librojn, ĉar mi estas leganto de faktaj libroj. Laŭ mi verko kiel *La akuzativo en sudnepalaj dialektoj* estas preferinda al *La mastro de la ringoj*. En unu temas pri veraj faktoj, en la alia pri fantazioj. Sed mi estas kontenta, ke mi fariscepton pri ĉi tiu verko.

Unuflanke ĝi estas historia verko, kiu reportas nin al la komenco de la pasinta jarcento, kiam aktivis niaj famaj pioniroj. Verdire la tre interesa enkonduko portas nin al la jaro 1323, kiam naskiĝis la Floraj Ludoj laŭ la legendo pro tragedia am-rakonto inter nobela fraŭlino kaj nobela trobadoro en Tuluzo. Sed por reveni al la komenco de la esperantlingva versio de la ludoj en 1909, ni trovas nin en la Universala Kongreso en Barcelono, kie en la Ludoj Émile Boirac prezidas la ĵurion kaj Antoni Grabowski okupiĝas pri la poemoj kaj Kazimierz Bein pri la prozaj verkoj. Kiel vi komprenas, temas pri la elito de la tiama elito en Esperantujo.

Kaj ankaŭ la verkemo ne estis pli malgranda ol en la nunaj Belartaj Konkursoj de UEA. Partoprenis 275 manuskriptoj, kaj Reĝino de la Ludoj estis Marie Hankel, germanino, kiu ricevis la premion Natura Floro.

Klasika Esperanto

Tamen en tiu enkonduko vi trovos ankaŭ priskribon de la sociaj-politikaj eventoj, kiuj akompanis tiun tragedian semajnon kaj la postan historion de Katalunio, pro kio la Ludoj ĉesis en 1936 pro la civitana milito kaj poste pro la nova regado de Francisco Franco. Ili povis rekomenciĝi nur en 1983.

Aliflanke mi antaŭpensis, ke la lingvo de tiuj verkoj gajnintaj la konkurson devus esti bela ekzemplo de klasika Esperanto, kaj fakte tia ĝi estas, kun ritmoj simplaj kaj tre similaj al la poemoj de Zamenhof. Oni legas ilin tre facile, kaj ili tre rapide komunikasian mesaĝon sen bezono surprizi la leganton per vorto konata nur al la poemverkinto.

Jen la unua strofo de la unua gajninta poemo:

Rozujo sovaĝa, simbolo de l' amo,
En vintro vi staras sen ia ornamo!
En kampo vi nuda ĉagrenas dezerte,
Rozujo, malvarmo mortigos vin certe.

Tolerema

Fine la libro estas interese ankaŭ pro tio, ke ĝi montras, kiom tolerema la Esperanto-movado estis dum sia tuta historio. La abundo da virinaj verkistoj en nia movado en la komenco de la pasinta jarcento, kiam virinoj en la ĝenerala socio ankoraŭ batalis por

siaj rajtoj, certe montras, ke nia socio estas akceptema al homoj, kiuj estas rigardataj „strangaj” en la normala socio.

La libro estas dulingva, esperanta kaj kataluna. Ne tion mi diros pri la kataluna parto, kiun mi povas facile kompreni pro mia denaska itala, sed kiun mi ne kapablas juĝi. ■



E. Abeyà Lafontana kaj X. Margais Basi:
Forte verki – Premiitaj virinoj en la internaciaj Floraj Ludoj (1909-1936).
Dulingva kataluna kaj esperanta.
Eld. Kataluna Esperanto-Asocio,
Barcelono, 2022.W

Stefan Maul

El verva vivo ĵurnalista



Faktoj kaj spertoj el la vivo de la honora ĉefredaktoro de



En la historio de Esperanto ofte ĵurnalistoj ludis sufiĉe gravan rolon. Unu el ili estas Stefan Maul, kiu dum 45 jaroj aktivas, verkante kaj redaktante. Li precipe konatiĝis kiel fondinto kaj multjara ĉefredaktoro de MONATO.

Kiel kaj kial li fariĝis esperantisto kaj ĵurnalisto, kiu batalas kontraŭ maljustaĵoj ĉiuspecaj, tion vi ekscias per tiu ĉi informriĉa kaj parte kortuŝa libro. Akompanu liajn ofte neordinarajn vivon kaj karieron de milit-infano ĝis la 25-jara jubileo de MONATO.

Prezo de la presita versio: 20,00 EUR + afranko;
prezo de la bitaj versioj: 10,20 EUR.

Mendu ĉe Flandra Esperanto-Ligo:
Lange Beeldekensstraat 169, B-2060 Antwerpen, Belgio
Rete: www.retbutiko.be - retbutiko@fel.esperanto.be